Somero 2017 Esperanto-Societo Kebekia Jaro 33, No 126-127

# La Riverego


Montrealo gastigos UK-on ! 2
KEA : invito al UK 6
UK : subteno de politikistoj 8-13
MeKaRo en Hamiltono 17
Serio : fundamentaj vortoj 20
Al la Mezo de la Mondo 21
LangFest 2017 24
Paralela Universo 27
Studu Interlingvistikon 28
Forpasis Jean Sorel 33


## 105-a Universala Kongreso :

## Montrealo 2020 !

### *105ᵉ Mondial d'espéranto :*

### *Montréal 2020 !*



# 105-a Universala Kongreso : Montrealo 2020 !

## *Le 105e congrès mondial d'espéranto aura lieu à Montréal !*



**Jes, vi povas kredi viajn okulojn, kaj denove jes, tio estas oficiala : la UK-2020 ja okazos en Montrealo ! Dum la ferma ceremonio de la UK en Seulo UEA anoncis ne unu, sed du sekvajn universalajn kongresojn : Lahti (Finnlando) en 2019 kaj Montrealo en 2020. La montreala Loka Kongresa Komitato, kiu havis la kuraĝon inviti kaj laboregos dum la venontaj tri jaroj por sukcesigi tiun ĉi, certe, historian eventon, respondas la demandojn !**

### Kial 2020 ?

Ĉar « 2020 » aspektas bele sur la informiloj kaj facilas ĝin memori ! ☺ Bone, nun serioze. La lasta fojo, kiam la UK okazis en Kanado, estis en 1984 en Vankuvero, kaj la lasta fojo, kiam la UK okazis en la orienta parto de Nord-Ameriko estis en la fora jaro 1910 en Vaŝingtono — tiam Zamenhof mem vizitis la kongreson ! Ni pensas, ke estas bona tempo rekongresi en la orienta parto de Nord-Ameriko post 110 jaroj, la duan fojon en Kanado post pli ol 30 jaroj kaj la unuan fojon entute en Kebekio ! Alia kialo por 2020 estas, ke UEA ĝenerale preferas havi du sinsekvajn eŭropajn kongresojn inter ne-eŭropaj kongresoj — certe ne temas pri strikta normo, sed tamen estas tia prefero. Do, de unu flanko, ni ne volis rompi tiun ritmon, kaj de alia flanko, ni volis havi multe da tempo por senhaste fari ĉiujn preparlaborojn.

**Tio estas la dua fojo, kiam Montrealo kandidatiĝis por gastigi la UK-on, ĉu ne ?**

Jes, ni kandidatiĝis la unuan fojon por tiu ĉi jaro, 2017, ĉar tio estas la jaro de la 150-jariĝo de Kanado kaj de la 375-jariĝo de Montrealo. La malgajno, kompreneble, estis tre malgajiga por ni kaj ĉiuj samideanoj en Kanado kaj Usono, kiuj volis kunfesti tiujn du okazojn ankaŭ per la kanada kongreso. Retrorigardante, tamen, ni pensas, ke la jaro 2020 estas same bona aŭ eble eĉ pli bona, ĉar tio donas al ni pli da tempo por plani, ellabori konceptojn kaj ankaŭ por simple pasigi bonan tempon kaj ĝui la kunlaboron !




**Kiu estas en la organiza teamo ?**

La kerna teamo konsistas el ses lokanoj. Normand Fleury, la prezidanto de Esperanto-Societo Kebekia (ESK), kiun UEA honoris pro elstara agado dum la UK en Seulo, estas la LKK-estro. Nicolas Viau, vic-prezidanto de ESK, estas ankaŭ la vic-prezidanto de la LKK. Joel Amis, la antaŭa ekzekutiva direktoro de ESF, estas alia vic-prezidanto de la LKK, kiu ankaŭ okupiĝos pri la rilatoj kun la kongresejo. Martin Morris, universitata bibliotekisto, estas la LKK-sekretario. Garry Evans, profesia ekonomikisto, estos nia kasisto. Ĵenja Amis, redaktorino de *La Riverego* kaj antaŭa redaktorino de *Kontakto*, okupiĝos pri la rilatoj kun esperantistoj kaj zorgos pri komunikado. Ŝi ankaŭ respondecos pri « frenezaĵoj » — ŝi havas multajn ideojn kaj esperas, ke kelkaj el ili realiĝos. Ni aldonu, ke ni tre ŝatas kunlabori kaj sincere ĝuas ĉiujn niajn kunvenojn !

**Kiu do estas la oficiala invitanto de la kongreso, ĉu KEA — la landa asocio de Kanado — aŭ ESK ? Kaj kiuj estas la rilatoj inter ili ?**

KEA, la Kanada Esperanto-Asocio, estas la oficiala invitanto ; la invito ja venas ĉiam de la landa asocio. ESK estas la loka organiza forto de la evento. La LKK-anoj estas plejparte membroj de ambaŭ organizoj. Ofte la estraranoj de KEA estas ankaŭ aktivaj en ESK kaj inverse. Ni, fakte, tre fieras pri la bonega kaj amika rilato inter KEA kaj ESK, kaj ni ofte kunlaboras pri organizado de eventoj (ekz. la partopreno en la Monda Socia Forumo pasintjare), eldonado (ekz. *La Eta Princo*), ktp. Do, la organizo de la UK estas jen plia ekzemplo de tia kunlaboro !

**Kiaj estas la rilatoj inter la UK-organizantoj kaj Esperanto-USA ?**

La usonaj samideanoj estas niaj plej bonaj amikoj. Ili apogis nin por la kandidatiĝo por 2017 kaj en 2020, per rezolucioj de pluraj urboj favore al la kandidatiĝo de Montrealo, kaj tre multaj usonaj esperantistoj esprimis la deziron kunlabori kaj volontuli dumkongrese. Cetere, la kanadaj kaj usonaj esperantistoj ofte kunkongresas, kaj du el la LKK-anoj (Joel kaj Ĵenja Amis) antaŭe loĝis en Usono kaj membras de jaroj en Esperanto-USA. Do, eĉ se oficiale la invito venas de unu landa asocio, ni intencas, kiel ĉiam antaŭe, multe kunlabori kun Esperanto-USA kaj certigi, ke usonanoj estas parto de la pli larĝa organiza teamo kaj ankaŭ ke usonaj kulturo, muziko, arto, ktp. estos prezentitaj dumkongrese.

**Vi sukcesis akiri la subskribon de la kanada ĉefministro, Justin Trudeau ! Kiel ? ☺**

La Montreala Turisma Oficejo (Tourisme Montréal) helpis akiri ĝin, kaj ankaŭ la aliajn gravajn subskribojn apoge al la kongreso (la ĉefministro de Kebekio, la urbestro de Montrealo, la estro de la flugkompanio Air Canada, ktp.). Ĝi subtenis nin ekde la komenco, kaj vere, sen ili ni ne kapablus fari ĉion, kion ni faris : la vizitojn al la hoteloj kaj kongresejoj, preparon de la provizora buĝeto kaj la tutan plurdekpaĝan kandidatiĝan dosieron. Ni estas treege dankemaj al ili. Niaj amikoj de Tourisme Montréal estas same feliĉaj pri la gajno, kiel ni mem, kaj kelkaj oficistoj eĉ diris, ke ili eble mem lernos Esperanton por 2020 !

**La esprimo « 20/20 » en la angla lingvo signifas perfektan vidkapablon. Ĉu vi intencas fari la « perfektan kongreson » ?**

Ni provos ! ☺ Ni havas fortan teamon kaj multegajn ekstreme kapablajn subtenantojn, kaj, kompreneble, ni havas la belegan multlingvan urbon Montrealo, kun riĉa historio, vidindaĵoj, muzeoj, muziko kaj festivaloj. Ni volas montri al esperantistoj el la tuta mondo nian belan urbon, kaj diskonigi Esperanton kaj nian unikan kulturon al montrealanoj. Kaj se perfekteco eble ne vere ekzistas, ni tamen esperas alproksimiĝi al ĝi tiom, kiom ni povos ! Kaj ni povas absolute garantii unu aferon : la kongresanoj pasigos belegan tempon kaj ĝuos partopreni la kongreson kaj la ekskursojn en nia rava urbo same multe, kiel ni ĝuas organizi ĝin !

**Ĉu estas io, kion oni povus fari por helpi en la organizado, ktp.?**

Jes ! Por fari tian eventon, kiel la UK, necesas multaj volontuloj. Kaj por certigi, ke ankaŭ tiuj, kiuj volontulos, havos la okazon ĝui la kongreson, necesos muuultaj dumkongresaj helpantoj. Ni invitas ĉiujn volontuli ne nur dum nia kongreso, sed ankaŭ dum la antaŭaj kongresoj : ĝi estas tre ĝua sperto, ĉar oni renkontas kaj amikiĝas kun tiom da esperantistoj ! Post iom da tempo estos preta la retejo, kaj tie ni havos specialan sekcion por volontuloj. Sed kial atendi ? Enskribiĝu jam nun : sendu la mesaĝon al volontuloj2020@gmail.com (vi povas ankaŭ skribi, kion vi ŝatus fari kaj kial vi ŝatus volontuli ; vi ankaŭ povas aldoni vian foton — ni uzos ĝin por la UK-retejo). Ni bezonos multajn volontulojn ne nur dumkongrese, sed ankaŭ antaŭ la kongreso : ekzemple, tradukantojn (inter la angla aŭ franca kaj Esperanto), homojn, kiuj subtitoligos filmojn aŭ videojn, helpos pri dezajno de informiloj, la ĝisdatigoj al la retejo, ktp. Ni antaŭdankas niajn volontulojn, kaj ni, kompreneble, intencas speciale honori ilin dumkongrese. Se vi ankoraŭ ne faris tion, vizitu kaj ŝatu la UK-paĝon en Facebook www.facebook.com/Montrealo.kongreso ! Kaj kompreneble, ne estas tro frue jam nun plani vojaĝon al Montrealo en 2020 kaj esti parto de tiu historia evento ! Ĝis la revido en Montrealo ! ☺

*Loka Kongresa Komitato (Garry, Joel, Ĵenja, Marteno, Nicolas, Normando)*

# KEA : invito de UK-2020 al Montrealo

Kanada Esperanto-Asocio

La 10-an de januaro 2017
p/a Paul Hopkins (prezidanto)
55,9520 Bonventure Drive SE Calgary,
Alberta (Kanado) T2J 0E5

La 10-an de januaro 2017

Veronika Poór
Ĝenerala Direktorino de UEA
Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam
Nederlando

Estimata S-ino Poór:

Nome de la estraro kaj membraro de Kanada Esperanto-Asocio (KEA), mi kun granda ĝojo invitas la 105-an Universalan Kongreson de Esperanto al Montrealo en 2020.

Montrealo estas centro de vigla Esperanta vivo kaj agado, ne nur en Kanado, sed en la tuta Nord-Amerika kontinento. Okazigo de Universala Kongreso en Montrealo estus ne nur grandega honoro por ni, sed ankaŭ grava impulso por la Esperanto-Movado en Nord-Ameriko, kontinento mankanta en la listo de UK-oj jam de pli ol 30 jaroj.

Laŭ movada vidpunkto, Montrealo estas ideala kongresurbo pro la longa historio de agado kaj event-organizado en la urbo kaj en ĉirkaŭaj regionoj. Montrealo jam gastigis UK-antaŭkongreson (1984), IJK-on (1992), Nord-Amerikan Kongreson (1998) kaj Tut-Amerikan Kongreson (2008), kaj ĉiujare Esperanto-Societo Kebekia (bazita en Montrealo) aranĝas la Mez-Kanadan Renkontiĝon (ekde 2003) kaj, kunlabore kun esperantistoj en nord-orienta Usono, Aŭtunan Renkontiĝon (ekde 1993). La loka movado, aktive subtenata de esperantistoj en la cetero de Kanado kaj en Usono, do havas solidan sperton pri organizado de Esperantaj eventoj por povi entrepreni la taskon organizi UK-on.

Laŭ kultura kaj socia vidpunktoj, Montrealo estas ankaŭ tre konvena loko por UK. Montrealo estas rara urbo en Nord-Ameriko (fakte eĉ en la mondo)

pro sia unika lingva situacio. La plej granda franclingva urbo en Kanado (dua en la mondo post Parizo), kaj ankaŭ la plej granda anglalingva komunumo en Kebekio, kun multaj aliaj lingvokomunumoj, Montrealo estas urbo kie la lingva demando estas ĉiam kaj ĉie sentata. La lingva diverseco de Montrealo estas do perfekta fono por la plej grava elmontriĝo de la Internacia Lingvo.

Tre historia urbo, Montrealo ankaŭ allogas per la turismaj ebloj kiujn ĝi proponas al kongresanoj. Vizitantoj ĝuas ne nur tradiciajn vidindaĵojn (preĝejojn, muzeojn, historian kvartalon), sed povas ankaŭ profiti de la abunda kultura diverseco de la urbo, vizitante la diversajn etnajn kvartalojn de Montrealo.

Konsiderindas, tamen, ne nur la specifaj allogaĵoj de Montrealo, sed ankaŭ la avantaĝoj de ĝia situo en Nord-Ameriko. Lastfoje okazis UK en Nord-Ameriko antaŭ 32 jaroj — kaj lastfoje en la orienta flanko de la vasta kontinento (la plej dense loĝata regiono de la kontinento) en 1910 ! La mondo multe ŝanĝiĝis dum la lastaj 32 jaroj, kaj nia movado ne estas escepto. Ekde la lasta UK en nia kontinento aperis lernu.net, kiu kreis tute novan demografion de esperantistoj ekster la tradicia movado. La lando kun la plej granda kvanto de registritaj uzantoj de Lernu estas Usono — kaj la kvanto de registritaj uzantoj en Usono plus Kanado estas jam pli ol 30 000 ! UK en Montrealo estus bonega okazo atingi ĉi tiujn retajn esperantistojn kaj engaĝi ilin en la « fizikan » Esperanto-komunumon.

Resume, Montrealo estas tre alloga urbo por UK laŭ kultura, turisma kaj movada vidpunktoj. Krome, la situo de Montrealo en orienta Nord-Ameriko signifas ke kaj Nord-Amerikanoj kaj Eŭropanoj povas facile atingi ĝin.

Kiel landa asocio de UEA en Kanado, KEA oficiale invitas la kongreson — sed ni ne estos solaj en tiu ĉi entrepreno : ni ĝuos la aktivan subtenon de Esperanto-Societo Kebekia surloke kaj kunlaboron de nia najbara landa asocio Esperanto-USA. Niaj fortoj kuniĝos por prepari neforgeseble belan sperton por la kongresanoj.

Kun samideanaj bondeziroj,

Paul Hopkins

Prezidanto de Kanada Esperanto-Asocio



PRIME MINISTER · PREMIER MINISTRE

Le 16 décembre 2016

Madame Veronika Poór
Directrice générale
Association universelle d'espéranto
Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam
PAYS-BAS

Madame,

Au nom du gouvernement du Canada, c'est avec grand plaisir que j'appuie la demande qu'a présentée la ville de Montréal pour être l'hôte du Congrès mondial d'espéranto 2020.

Je suis très heureux que vous envisagiez de tenir votre congrès dans notre pays et je suis persuadé que tout sera mis en œuvre pour vous assurer un séjour des plus agréables. J'ose espérer que Montréal aura l'honneur d'accueillir les membres de votre association.

Je vous souhaite une conférence couronnée de succès.

Cordialement,

Le très hon. Justin P. J. Trudeau, C.P., député
Premier ministre du Canada

# Ĉefministro



16-an de decembro 2016

Sinjorino Veronika Poór
Ĝenerala Direktorino
Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam
Nederlando

Estimata sinjorino,

Nome de la registaro de Kanado, mi kun granda plezuro apogas la peton, kiun prezentis la urbo Montrealo por gastigi la Universalan Kongreson de Esperanto 2020.

Mi tre ĝojas, ke vi konsideras okazigi vian kongreson en nia lando kaj mi estas certa, ke ĉio estos farita por certigi la plej agrablan restadon por la kongresanoj. Mi aŭdacas esperi, ke Montrealo ĝuos la honoron bonvenigi la membrojn de via asocio.

Mi deziras al vi sukceskronitan kongreson.

Kore,

La tre honorinda Justin P. J. Trudeau, C. P., deputito
Ĉefministro de Kanado



Québec

Gouvernement du Québec
**Le premier ministre**

Le 16 décembre 2016

Madame Veronika Poór
Directrice générale
Association Universelle d'Espéranto
Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam
Les Pays-Bas

Madame la Directrice générale,

Le Québec serait fier d'être l'hôte du Congrès mondial d'Espéranto 2020 et d'accueillir à Montréal ses participants de tous les continents.

Depuis des décennies, Montréal figure parmi les grandes villes les mieux réputées pour recevoir des événements d'envergure nationale et internationale de tous genres: délégations politiques, congrès, expositions, championnats sportifs, etc.

Avec ses nombreux festivals et événements culturels qui s'y déroulent en toute saison, avec son offre hôtelière de grande qualité, ses installations ultramodernes et ses restaurants gastronomiques, Montréal, une ville où plus de 160 langues sont parlées, est certainement l'un des centres urbains les plus cosmopolites, les plus invitants et les plus sécuritaires en Amérique du Nord.

À titre de premier ministre du Québec, c'est avec plaisir que je vous invite à choisir Montréal et notre belle province de Québec comme site pour la tenue du Congrès mondial d'Espéranto.

Vous serez les bienvenus dans notre métropole en 2020!

Philippe Couillard

# Kebekio| Registaro de Kebekio | La ĉefministro



16-an de decembro 2016

Sinjorino Veronika Poór
Ĝenerala Direktorino
Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Estimata Ĝenerala Direktorino,

Kebekio estus fiera gastigi la Universalan Kongreson de Esperanto 2020 kaj ĝiajn partoprenantojn en Montrealo.

Jam de jardekoj Montrealo estas unu el la grandaj urboj kun la plej alta reputacio rilate al la gastigo de ĉiuspecaj eventoj naciaj kaj internaciaj : politikaj delegacioj, kongresoj, ekspozicioj, sportaj konkursoj ktp.

Dank' al ĝiaj multaj festivaloj kaj kulturaj eventoj en ĉiu tempo de la jaro, dank' al ĝia altkvalita hotelaro, ĝiaj modernegaj eventejoj kaj ĝiaj gastronomiaj restoracioj, Montrealo — urbo, kie oni parolas pli ol 160 lingvojn — certe estas inter la urbaj centroj nordamerikaj la plej kosmopolitaj, la plej gastigemaj kaj la plej sekuraj.

En mia funkcio de ĉefministro de Kebekio, mi kun plezuro invitas vin elekti Montrealon kaj nian belan provincon Kebekion kiel lokon por la Universala Kongreso de Esperanto.

Vi estos bonvenaj en nia metropolo en 2020 !

Philippe Couillard

## Le Maire de Montréal



Le 5 décembre, 2016

Madame Veronika Poór
Directrice générale
Association Universelle d'Espéranto
Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam,
Les Pays-Bas

Madame Poór,

La Ville de Montréal, sa population et moi-même, serions particulièrement heureux de recevoir les participantes et participants du *Congrès mondial d'Espéranto* en 2020. Je suis convaincu que vous y trouverez à Montréal un lieu particulièrement stimulant pour vos échanges.

À la veille de son 375e anniversaire, Montréal compte parmi les villes les plus anciennes d'Amérique du Nord et se trouve au carrefour des influences américaines et européennes. Elle possède une personnalité originale dont elle a su tirer parti pour tisser des liens avec tous les continents. Métropole culturelle cosmopolite, particulièrement animée, Montréal jouit d'une excellente réputation sur le plan de la créativité artistique et gastronomique.

Ville de savoir, on y dénombre quatre universités, deux de langue française et deux de langue anglaise, des grandes écoles et des instituts de recherche d'envergure internationale. Si notre ville possède tous les attraits d'une métropole internationale, ses visiteurs apprécient chaque fois aussi sa dimension humaine, la qualité de l'accueil, la joie de vivre et le sens de l'hospitalité de sa population.

En attendant le plaisir de vous savoir à Montréal, je vous prie d'agréer, Madame Poór, l'expression de mes sentiments les meilleurs.

Denis Coderre
Maire de Montréal

Hôtel de ville, 275, rue Notre-Dame Est, Montréal (Québec) H2Y 1C6 CANADA
Téléphone : 514 872-3101 Télécopieur : 514 872-4059 maire@ville.montreal.qc.ca

## Urbestro de Montrealo

5-an de decembro 2016

Sinjorino Veronika Poór
Ĝenerala Direktorino
Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Sinjorino Poór,

Akcepti partoprenantojn de la Universala Kongreso de Esperanto en 2020 vere feliĉigus la urbon Montrealon, ĝian loĝantaron kaj min persone.  Mi estas konvinkita, ke vi trovos en Montrealo lokon aparte stimulan por viaj interŝanĝoj.

Atingante sian 375an datrevenon, Montrealo, unu el la plej malnovaj urboj en Nord-Ameriko, troviĝas ĉe kruciĝo de amerikaj kaj eŭropaj influoj.  Tiun originalecon ĝi uzis por starigi ligojn kun ĉiuj kontinentoj. Kulture internacia urbego, aparte vigla, Montrealo famegas pro sia kreemo arta kaj gastronomia.

Urbo de scioj, en ĝi troviĝas kvar universitatoj — du franclingvaj kaj du anglalingvaj — , mondskalaj esplorinstitutoj kaj aliaj gravaj altlernejoj. Dum nia urbo posedas ĉiujn ecojn de internacia urbego, al ĝiaj vizitantoj ĉiam plaĉas ankaŭ ĝia homa dimensio kaj la gastama akceptemo kaj vivĝojo de ĝia loĝantaro.


Atendante la plezuron ekscii pri via alveno en Montrealo, mi petas vin akcepti, sinjorino Poór, la esprimon de miaj plej sinceraj bondeziroj.

Denis Coderre
Urbestro de Montrealo

# Montrealo 375-jara : Feliĉan jubileon !

## *Ĵenja Amis*


**« Montrealanoj scias festi ! », mi aŭdas ofte admirajn vortojn de miaj amikoj, kiuj vizitas la urbon. Kaj imagu la festegon por la 375-jariĝo de Montrealo ĉi-jare ! Se vi ne loĝas en Montrealo aŭ ne vizitas nin ĉi-jare, ne timu. Montrealo festas ne nur en tiu ĉi jaro, sed pli-malpli ĉiam, kaj pro tio, ke la urbo elektiĝis por la UK-2020, ankaŭ vi havos la bonegan okazon veni kaj kunfesti ! Intertempe, ĝuu kelkajn fotojn de la plej lastaj eventoj en nia urbo !**



### *Cité Mémoire*

**Inspirita de la historio de Montrealo, *Cité Mémoire* (Urbo de Memoro) estas aro da noktaj eksteraj vide-projekciaĵoj, kiuj invitas vin konatiĝi kun kelkaj historiaj personecoj de Montrealo. La projekciado okazas sur la konstruaĵoj, trotuaroj kaj eĉ... sur la arboj ! Per senpaga apo, vi ankaŭ povas aŭdi la rakontojn kaj la historion de ĉiu personeco, dum vi spektas la projekciaĵon.**



## *Avudo*

***Avudo*** **estas spektaklo-omaĝo al la rivero Sankta-Laŭrenco, dediĉita al la historio de la urbo. La lum-spektaklo okazas sur la akvo, en la haveno mem. Estu preta vojaĝi en la pasintecon !**






## La ponto, lumigita... de vi !

Ĉiuvespere la ikona montreala ponto Jacques-Cartier lumiĝas per koloroj de la sezono kaj de la tago : de la verda printempe, al la oranĝa somere kaj ruĝa aŭtune, ĝis la blua vintre. Ĉiu tago de la jaro havas specialan nuancon de la sezona koloro. Sed tio ne estas ĉio ! La lumoj dancas laŭ la « pepaĵoj » (tweets) senditaj de ni ĉiuj ! Eĉ se vi ne loĝas en Montrealo, vi povas sendi pepaĵon ĉe #IlluminationMtl, #375MTL, #Montréal, #Mtl aŭ #Mtlmoments, kaj la ponto ĝin « kaptos » kaj transformos en lummoviĝon ! Se iu « ŝatos » vian pepaĵon, la lumo grandiĝos, kaj se iu « dividos » ĝin, la lumo plirapidiĝos. Laŭ Montreala Turismo, tiu ĉi ponto estas la unua konektita ponto en la mondo!

## Expo 67 en niaj memoroj

Estas dekoj da ekspozicioj memore al Expo 67 en Montrealo : la fama tutmonda foiro kaj la plej granda festo de la planedo antaŭ 50 jaroj, kiu unuigis kaj amikigis eĉ la malamikojn de la malvarma milito : Usonon kaj Sovetunion !



# Neplanite ĉe MeKaRo

**La Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto estas unu el la plej sukcesaj Esperanto-eventoj en Nord-Ameriko. Ĝi okazas jam de 14 jaroj alterne en Kebekio kaj Ontario, kaj ĉi-jare estis Hamiltono, kiu gastigis la ĉarman grupon de ĉ. kvardek esperantistoj. Ni ankaŭ havis la bonŝancon akcepti inter ni esperantiston el Eŭropo : Xavier Alcalde, el Barcelono, lastatempe loĝanta en Florenco, Italio, kiu verkis tiun ĉi artikolon — Red.**

***Xavier Alcalde***

Mi venis al Hamiltono kun iom da hezito. La kialo de mia vojaĝo al Kanado estis nek turismumi nek esperantumi, sed intervjui Eduardon Vivancos por biografia projekto prie. Ĉar eble kelkaj legantoj ne konas lin, mi devas diri ion pri li. Temas pri senlaca Esperanto-propagandisto ekde pli ol 80 jaroj. Li naskiĝis en Barcelono en 1920. Profunde bonkora kaj idealisma, li eklernis la lingvon en proleta medio dum la hispana enlanda milito. Poste li volontulis kiel ano de la respublikana armeo kontraŭ la faŝismo. Estis ĝuste en la fronto, kie li unue instruis la Zamenhofan lingvon al siaj junaj soldataj kamaradoj. Poste li devis ekziliĝi al Francio, kie li pasigis plurajn jarojn en koncentrejoj. Ankaŭ tie li instruis la lingvon al hispanaj (kaj ne nur) rifuĝintoj. Post la milito li kunfondis tutmondan asocion de junaj liberecanoj kaj redaktis ĝian revuon *Senŝtatano*, kiu estis verkita tute en Esperanto. En Toronto li iĝis la motoro de la loka movado kaj restis aktiva dum ses jardekoj. Li ĉeforganizis SAT-kongreson tie en 1973, la unuan fojon ekster Eŭropo.



Kiam oni proponis al mi partopreni en la ĉi-jara MeKaRo, mi pensis, ke estus interese koni

esperantan renkontiĝon en Nord-Ameriko. Krome, eble mi povus havi fruktodonajn babiladojn pri Eduardo. Kaj tiel estis. Ĝenerale homoj ŝatis mian projekton. Kaj ankaŭ mi tre ĝuis la tempon en Hamiltono. La unua diferenco kun la renkontiĝoj en Eŭropo estas la uzo de la aŭtomobilo, kiu en Nord-Ameriko estas nepra. Aparte plaĉis al mi la interrilatojn inter la ontariaj samideanoj kaj tiuj, kiuj venis el Kebekio kaj eĉ el Usono. La fakto, ke temas pri malgranda renkontiĝo, ebligas konatiĝi kun (preskaŭ) ĉiuj el la partoprenantoj. Jen granda avantaĝo de tiaj eventoj. Sekve, la etoso varmas. En la alia flanko de la skalo oni trovas UK-on, kiu estas interesa pro aliaj kialoj, sed kiu ne tiel varmas. Probable, mia plej ŝatata programero estis la ludo post la dimanĉa vespermanĝo. Mi ankaŭ ĝuis la botanika(j)n ĝardeno(j)n, verŝajne la




plej substrekinda vidindaĵo en la urbo. La viskio en la distilejo certe bongustis, kaj mi ankaŭ lernis pri historio en la vapormuzeo. Kiel pacema homo, mi malpli interesiĝis pri la detaloj de la armiloj en la militŝipo. Tio okazas, ne ĉiuj programeroj povas taŭgi por ĉiuj homoj.

Kvankam bonaj recenzoj devas enhavi konstruajn kritikojn, ĉi-foje tio ne facilas. Mateo kaj Jed bonege zorgis pri ĉiu detalo, tiel ke la partoprenantoj devis nur ĝui la etoson, kion ni certe faris.

Interalie, la tag- kaj vespermanĝoj estis ĉiam sukcesaj el ĉiu perspektivo. Tamen, se mi devus mencii ion, mi dirus, ke estintus eĉ pli bone, se en iu el la ekskursoj la gvidanto parolus esperante. Kompreneble, tio postulus multe pli da penoj, ekzemple viziti antaŭe la lokon por koni la enhavon de la programero kaj tiel pretigi





esperantistiĝon prie... Aldone, eksterlandano, kiu neniam estis en la regiono, ŝatintus viziton al la akvofaloj de Niagaro. Tamen, la saĝaj organizantoj taŭge proponis viziton al alia akvofalo, kiu efike impresis min. Resume, neniun plendon mi havas. Mi sentas min bonŝanca, ke mi havis la okazon partopreni la ĉi-jaran MeKaRon kaj aparte ŝatis konatiĝi kun la samideanoj de Kebekio. Espereble ni vidos nin denove kadre de estonta UK en Montrealo !


*Fotoj : David Cohen (ĉiuj krom la grupfoto), Ĵenja Amis (grupfoto).*

**Kiu venis al MeKaRo : 21 Esperantistoj el Ontario, 9 el Kebekio, 5 el Usono, 1 el Italio (entute 36).**



# Malpli oftaj fundamentaj vortoj 6

*Francisko Lorrain*




**Iam kaj tiam oni renkontas fundamentan radikon, kiun ni povus pli ofte uzi. Jen la sesa ero de kroniko prezentanta ĉiufoje kelkajn malpli ofte uzatajn fundamentajn radikojn. La difinoj kaj ekzemploj estas ĉerpitaj el *La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto* (Paris, Sennacieca Asocio Tutmonda), kiu markas ĉiujn fundamentajn vortojn per stelo ★. Komentoj miaj aperas inter rektaj krampoj [ ]. Alta Z indikas zamenhofan citaĵon aŭ vorton, alta X citaĵon el la *Hebrea Biblio* (Malnova Testamento) laŭ la Londona eldono.**



★ **cim/o 1** Vulgara nomo de ĉiu insekto el la ordo de heteropteroj [france *punaise*]. **2** G. (*Cimex*) de plataj, malbonodoraj insektoj el la ordo de hemipteroj, subordo de heteropteroj, kun kriplaj flugiloj : *abomena ĉambro, k ~oj tiaj, kiajn mi nenie vidis : ili mordas kiel hundoj* [Z]. **3** Fm nomo de fuŝo en komputila programo : *sen~igilo*.



★ **cir/o.** Ŝmiraĵo, por brilpurigi ledaĵojn. **ciri** (tr) Brilpurigi, frotante per ~o: *~i botojn, ledan paperujon, jungilaron* ; *ŝu~isto*.

★ **cirkel/o.** Ilo, uzata por desegni cirklojn aŭ por transporti distancon, ĝenerale konsistanta el du ĉarnire kunigitaj brakoj : *alia lignon rabotas, ĉirkaŭsignas per ~o k faras el ĝi bildon de homo* [X].



# Vojaĝo al la Mezo de la Mondo

*Normand Fleury*

***L'auteur a passé deux mois en Équateur, où les climats très différents des diverses régions du pays permettent une biodiversité extraordinaire. Il a passé plus d'un mois dans la réserve naturelle de Merazonia, où il a aidé un étudiant en biologie à identifier plus de 125 espèces d'oiseaux. À Quito, la capitale, il a même rencontré deux espérantistes débutants, avec qui il a pu longuement parler.***

Du monatoj en la suda hemisfero estas sperto en si mem por Nordulo kiel mi… kaj precipe kiam la ĉefa celo de la vojaĝo estas ornitologio kaj vivi meze de ĝangalo sen elektro kaj moderna komforto. Mi revenis meze de marto 2017 de vojaĝo al Ekvadoro, malgranda lando en nordokcidenta Sud-Ameriko, kun konsiderinda biodiverseco (fakte inter la plej grandaj en la mondo kun Brazilo, Kolombio, Meksiko, Peruo, Venezuelo). En Nord-Ameriko, estas ĉirkaŭ mil specioj de arboj, estas pli ol 2 500 en Ekvadoro, kaj estas 20 000 specioj en Sud-Ameriko. Pli da arboj, do pli da insektoj, kaj do pli da birdoj.



Ĉe restoracio *El Maple* en Quito kun Quiliro kaj lia amikino, Ana Lucía.

Tia granda biodiverseco ne fontas simple el tio, ke Ekvadoro estas varma lando, sed ĉefe el la vasta gamo de pejzaĝoj kaj altitudoj, de marnivelo al pli ol kvar mil metroj. La pacifika marborda regiono estas varmega, dum la centro de la lando estas trairita de la Andoj kun multaj pintoj super tri mil metroj. Ĉi baro inter la Okcidento kaj la Oriento favoris malkonverĝan evoluon en la birdaroj. La Oriento de la lando inkludas amazonian zonon apudan al tiu de Brazilo. Estas interese, ke ĉe alta montpinto centre de la lando, kiel ekzemple en la nacia parko Cajas, la gvidanto menciis, ke, kiam pluvas,

la akvo falanta ĉe la orienta flanko fluos ĝis la amazonan riveregon kaj Atlantikon, dum la akvo ĉe la alia flanko eniros en la Pacifikon.

En Ekvadoro estas pli ol 1 600 specioj de birdoj, de malgrandaj kolibroj (136 specioj) ĝis la giganta kondoro de la Andoj (ve, mi maltrafis vidi ĝin). De meze de januaro ĝis fine de februaro, mi estis ĉefe en Merazonia, besta protektejo en natura medio ĉirkaŭ 1 200 metrojn super la marnivelo. Vivas en la regiono pli ol 500 birdspecioj, defio por novulo, kiel mi, en tia medio. Mi asistis studenton pri biologio por fari la unuan birdan inventaron en la protektejo. Ni identigis pli ol 125 speciojn en najbareco de Merazonia.


Mi vivis en tia kabano dum 6 semajnoj meze de tropika arbaro.

Krom la inventaro, ni respondecis ankaŭ pri liberigo de 15 blukapaj papagoj. Bedaŭrinde, homoj daŭre iras en la ĝangalon kaj kaptas bestojn (simiojn, bradipojn, papagojn, ktp.) por vendi ilin aŭ havi ilin kiel hejmbestojn. Tion la leĝo ne permesas. La bestojn oni forprenas de tiuj fiuloj kaj transdonas al protektejoj aŭ bestĝardenoj. Ne ĉiam eblas liberigi ilin, ĉar foje ili estis tro longe enkaĝe, kaj la bestoj ne scias plu kiel nutri sin, aŭ simple tro alkutimiĝis vivi endome kun homoj.

En Merazonia oni akceptas ĉefe bestojn kun la celo reliberigi ilin. Estis do tre bela sperto tion fari kun papagoj. Estas preciza protokolo sekvenda dum monato, por certigi, ke la papagoj travivos kaj adaptiĝos al sia nova medio… al libera ennatura vivo.

Fakte, ne estas facile priskribi la sperton tiel, ke vi povu ankaŭ senti la pluvegojn preskaŭ ĉiutagajn, la sonon de ranoj kaj insektoj nokte, la buntecon de la plantoj kaj floroj.

Krom vivi en Merazonia, mi pasigis kelkajn tagojn en la nacia parko Cajas, por sperti kiel malsamas la naturo super tri mil metroj. Nu, ne nur la naturo malsamas… sed ankaŭ la temperaturo, kiu

atingas nur 12 °C tage. Ne estas arboj, nur herbejoj, sed tamen birdoj. Mi ankaŭ estis semajnon ĉe la marbordo en Puerto López, kaj tie la temperaturo estis 30 °C kun brile brulanta suno. Palmarboj donas tute alian etoson, kaj denove vidiĝas novaj birdoj kiel albatroso kaj pelikano. Mi ekskursis al la *Isla de la Plata*, kiu estas la Galapago de la malriĉuloj. Facilas iri tien por vidi apartajn birdojn (mi vidis ankaŭ marajn testudojn kaj delfenojn) sen devi pagi altan sumon. Mi volis nepre vidi la blupiedajn sulojn (FR : fou, EN : gannet) kaj ja sukcesis vidi kelkajn.

Mia vojaĝo finiĝis en Quito, ja 2 850 metrojn super la marnivelo. Denove mi spertis, ke mi malrapide paŝu, aparte kiam temas pri ŝtuparo. Rapide la koro batas vigle, kaj oni bezonas multe spiri, kvazaŭ aero mankas. Interesa sperto, sed ne nepre agrabla.

Nu, ĉar temas pri *La Riverego*, mi ja devus raporti pri io rilate al Esperanto, ĉu ne ? Post esploro diversloke, mi ricevis nomojn de kelkaj esperantistoj ekvadoraj. Unu estis studanta en Meksiko, alia ne respondis, sed post longa tempo mi ricevis mesaĝon de Quiliro el Quito. Li estas komencanto kaj instruas al sia amikino, Ana Lucía. Ni pasigis duontagon kune, tiom multe babilis, ke ili diris, ke al ili la kapo turniĝas. Estis la unua sperto por ili aŭdi kaj paroli Esperanton. Ili elektis la restoracion, kaj mi indikis, ke mi preferus vegetaran lokon. Tio taŭgis al ili ankaŭ, kaj, amuze kaj ne intence, ni venis al restoracio, kiu nomiĝis *El Maple* (La Acero) — vidu la unuan foton. La posedanto elektis la nomon, ĉar li ŝatas ĝin kaj Kanadon. Tiel verde finiĝis mia sperto en verdega Ekvatoro. Iam mi ŝatus reiri, ĉar mi ne vidis ĉion, kion mi volis… kaj restas 1 315 birdspeciojn por malkovri.

** La ekvatoro trairas Ekvadoron iomete norde de Quito, kaj la loko estas nomata « Mitad del mundo » : mezo de la mondo.*

# Plurlingvuloj, unuiĝu en Montrealo !

*Nicolas Viau*

***Vous aimez les langues ? Vous êtes ou voulez devenir polyglotte ? Cet été, Montréal accueillera, du 25 au 27 août, le Festival des langues de Montréal (« LangFest »), un rassemblement autour du thème des langues, qu'il s'agisse d'apprentissage ou de tout autre sujet s'y rapportant. Les participants auront l'occasion d'assister à des conférences passionnantes ainsi que d'échanger avec d'autres passionnés. De plus, l'espéranto ne sera pas absent !***

**Multaj esperantistoj estas plurlingvemuloj kaj ŝatas lerni lingvojn. Bonŝance, okazos ĉi-jare la Montreala Lingva Festivalo (konata ankaŭ kiel « LangFest »), al kiu mi plezure kontribuas kiel kunorganizanto kaj prelegonto, de la 25-a al la 27-a de aŭgusto 2017 ĉe Universitato Concordia.**

LangFest-2017 sekvas la pasintjaran Nordamerikan Plurlingvulan Simpozion, kiu estis la unua eldono de la evento (la nomo estis ŝanĝita al LangFest por esti pli alloga). La pasintjara plurlingvula simpozio kunigis pli ol 150 homojn ĉefe de Nord-Ameriko, sed ankaŭ de aliaj lokoj. Venis konataj plurlingvemaj famuloj, kiel Steven Kaufmann (el Kanado, konata interalie pro la populara retejo LingQ.com), Benny Lewis (el Irlando, fama pro siaj blogo kaj libroj) kaj ankaŭ pluraj lokaj prelegantoj, kiel mi mem (mi prelegis pri Esperanto) kaj Suzano Roy (kiu donis enkondukan kurson pri la lingvo).

Ĉi-jare inter la prelegantoj denove troviĝos Kaufmann, sed estos ankaŭ multaj novaj nomoj, ekzemple, Stephen Krashen : profesoro pri lingvistiko kaj unu el la plej elstaraj fakuloj pri akiro de lingvoj ; la Brita plurlingvulo Richard Simcott, kaj Bella Devyatkina, juna rusa knabino, kiu parolas sep lingvojn jam je la aĝo de nur kvar jaroj (ŝi venos kun sia patrino Yulia). Ankaŭ pluraj lokanoj prelegos, kiel la ĉeforganizanto de LangFest, Tetsu Yung, kaj Joey Perugino. Prezentos ankaŭ Lýdia Machová,

Slovaka Esperantisto kaj pli kaj pli konata plurlingvula aktivulo, kunorganizanto de la pasintjara UK en Nitra kaj ĉeforganizanto de la ĉi-jara *Polyglot Gathering* (Eŭropa plurlingvemula evento). Mi, cetere, denove faros prezentaĵon — ĉi-foje pri lingvaj problemoj en internacia komunikado.



**Bella Devyatkina kun siaj diverslingvaj vartistoj (weirdrussia.com)**

Ŝajnas, ke pluraj lingvemuloj interesiĝas pri Esperanto nuntempe… Multaj lernas per retaj metodoj, kiel Duolingo. Mia impreso estas, ke scivolemo pri la lingvo nun estas kreskanta. Ili certe bonvenigus renkontiĝojn kun aliaj parolantoj por ekzerciĝi !

Ĉu vi ŝatus ekkoni aliajn lingvoentuziasmulojn ? Ĉu paroli plurajn lingvojn dum la sama tago ? Ĉu interŝanĝi metodojn, trukojn ktp pri lingvolernado kun aliaj partoprenantoj ? Ĉu renkonti plurajn mirindajn plurlingvulojn ? Kaj ĉu vi ŝatas lerni, babili, amuziĝi, malkovri aŭ malkovrigi Montrealon al vizitantoj ? Aŭ eble vi ŝatus nur pli facile lerni duan aŭ trian lingvon ? Aliĝu al la Montreala Lingva Festivalo ! Ni aparte celas popularigi la renkontiĝon, kaj ni atendas buntan partoprenantaron de kelkcent personoj. Fariĝu unu el ili kaj ne hezitu paroli pri la evento al aliaj interesatoj ! Venigu viajn amikojn : estas rabatoj por aĉetoj de pluraj biletoj. Se vi loĝas en aŭ apud Montrealo (aŭ fakte ie ajn), nepre partoprenu !

**Pli da informoj :**

**Retejo** : montreal.langfest.org

**Biletoj** : eventbrite.ca/e/langfest-montreal-20170825-27-tickets-30488636332

**Facebook** : facebook.com/LanguageFestival

**Twitter** : twitter.com/langfest

# Amikumu por ĉiuj lingvoj en kvar kanadaj urboj !

Vi certe jam aŭdis pri Amikumu — la aplikaĵo por saĝtelefonoj, per kiu oni povas trovi kaj kontakti proksimajn esperantistojn. Aŭ eble vi eĉ mem uzas ĝin ! La aplikaĵo lanĉiĝis por esperantistoj en aprilo 2017, kaj jam ene de la unua tago ekhavis milon da uzantoj — kaj tiu nombro daŭre kreskas. Jen bona novaĵo por kanadanoj ! Inter la 25-a kaj 27-a de aŭgusto, kune kun la Montreala Lingva Festivalo, LangFest, Amikumu lanĉiĝos **por ĉiuj lingvoj** en kvar kanadaj urboj : Montrealo (unue), Toronto, Otavo kaj Kebeko !



Festo por eltrovado kaj konektado per lingvoj, LangFest promesas multajn bonegajn okazojn por renkonti aliajn kun kiuj vi povas paroli viajn amatajn lingvojn : tio povas esti Esperanto, rusa, gaela, aŭ kiu ajn alia lingvo ! Estu certa, ke vi renkontiĝos kun multaj lingvaj entuziasmuloj, kiuj lernas aŭ parolas la francan, hispanan, italan, portugalan, polan, korean, japanan, mandarenan aŭ Esperanton. Sed ne miru, se vi flanke aŭdos (aŭ partoprenos en) konversacioj per, ekzemple, la usona signolingvo, gaela, kria, joruba aŭ gronlanda. Elŝutu la apon kaj trovi proksimulojn, kiuj parolas Esperanton… aŭ kiun ajn alian lingvon !

Cetere, LangFest speciale ofertas al ĉiuj Amikumanoj rabatitajn biletojn por la evento. Simple iru al [montreal.langfest.org](montreal.langfest.org), uzu la kodon « Amikumu » kaj ŝparu 25% de la biletkosto !

Amikumu ankaŭ invitas ĉiujn loĝantojn de Toronto, Otavo, Montrealo kaj Kebekurbo aboni la retlistojn pri lanĉiĝoj :

**Francaj retlistoj**
Toronto: https://amikumu.com/fr/Toronto2/
Ottawa: https://amikumu.com/fr/Ottawa2/
Montréal: https://amikumu.com/fr/Montreal2/
Québec: https://amikumu.com/fr/Quebec2/

**Anglaj retlistoj**
Toronto: https://amikumu.com/en/Toronto/
Ottawa: https://amikumu.com/en/Ottawa/
Montreal: https://amikumu.com/en/Montreal/
Quebec City: https://amikumu.com/en/Quebec/

# Venu al Paralela Universo en Montrealo !

***Bienvenue à la deuxième édition de Paralela Universo, une rencontre d'espéranto d'une journée qui a lieu dans plusieurs villes nord-américaines. Son but est de permettre aux participants de parler espéranto en personne, de rencontrer de nouveaux amis et de laisser de beaux souvenirs ! Venez le 19 août à midi !***

**Bienvenue ! Welcome ! Bonvenon al la dua Paralela Universo — unutaga Esperanto-evento, kiu okazos en diversaj urboj en la mondo. La evento okazos sabaton, la 19-an de aŭgusto 2017.**

La ideo estas ebligi senperan esperantlingvan kunparoladon persone kaj amikiĝon inter partoprenantoj, kaj krei agrablajn memorojn. Ni piknikos (ni havas alternativan planon, se pluvos), promenos en la haveno kaj vizitos kelkajn plej belajn vidindaĵojn en malnova parto de la urbo, kiu ĉi-jare festas sian 375-jariĝon ! Fine, ni vespermanĝos restoracie. Ni renkontiĝos en Palais des Congrès de Montrealo, apud la restoracio Terra Verde, metrostacio Place d'Armes. Se vi malfruos aŭ perdiĝos, telefonu aŭ tekstu al Ĵenja Amis (438-988-4078) aŭ mesaĝu per Fejsbuk aŭ Telegram. Vizitu la Fejsbuk-paĝon de nia evento (vi trovos ĉiujn detalojn tie) : facebook.com/events/320908748347136/ ; pri Paralela Universo : paralelauniverso.com






Montrealaj esperantistoj en junio 2017

# Studu interlingvistikon en Poznano !

**Aliĝu al la nova grupo de la unikaj Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj festu kune ilian 20-jariĝon kadre de la kvara Interlingvistika Simpozio en septembro 2017 !**

Nur ĉiun trian jaron komencas siajn studojn nova grupo ĉe la Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznano, kaj la sekva ebleco estos ĉi-septembre (oni akceptas aliĝojn ĝis la 20-a de aŭgusto 2017). Unu el la plej prestiĝaj universitatoj en Pollando, UAM ofertas programon unikan en la tuta mondo : la trijarajn eksterajn postdiplomajn studojn pri interlingvistiko kaj esperantologio, tute en Esperanto. La speciala programo estis aprobita antaŭ 20 jaroj : la unua grupo komencis siajn studojn en 1998, kaj la sesa grupo finos siajn studojn en septembro 2017. La festo okazos dum la 4-a Interlingvistika Simpozio (21-22-an de septembro), tuj post la interlingvistika sesio kaj antaŭ la tradicia kultura festivalo Arkones.

La internacia kursaro okazas en la Lingvistika Instituto de UAM, sub la gvido de la fondinto de la programo, prof. Ilona Koutny. Ŝi dediĉis 30 jarojn de universitata kariero al la instruado de esperantologio. En la budapeŝta universitato Eötvös (ELTE) ŝi plenumis tion kiel ĉefan taskon en la Esperanto-fako, kiun fondis d-ro István Szerdahelyi en 1966 kaj ŝi transprenis ĝin post lia morto en 1987. En 1991 ŝi kun kolegino, d-rino Zsuzsa Varga-Haszonits, fondis la unuajn internaciajn esperantologiajn studojn. Poste en UAM ŝia agado dividiĝas inter la hungara kaj la interlingvistika fakoj.

Inter la prelegantoj de la Interlingvistikaj Studoj ĉiam estis kaj estas elstaraj esperantologoj, kiel profesoroj Vera Barandovská-Frank, Vilmos Benczik, Duncan Charters, Renato Corsetti, Probal Dasgupta, Nicolau Dols Salas, Sabine Fiedler, Zbigniew Galor, Aleksander Melnikov, Humphrey Tonkin kaj John Wells ; doktoroj Detlev Blanke, Katalin Kováts, Ulrich Lins kaj Blazio Wacha ; la poetino Lidia Ligęza, ekspertoj de sia tereno, kiel Michel Duc Goninaz, Tomasz Chmielik, István Ertl, Michael Farris, Aleksander Korĵenkov, Maria Majerczak, Ziko van Dijk kaj Zsófia Kóródy.

La Interlingvistikaj Studoj donas superrigardon pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko por havi bazon por la studado de la lingvistikaj aspektoj de Esperanto.

Ili fokusiĝas al internacia kaj interkultura komunikado, traktas planlingvojn kaj detale okupiĝas pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de Esperanto. En la tria jaro eblas specialiĝi pri komunikado, lingvistiko, literaturo, tradukado, planlingvistiko aŭ pri lingvopedagogio. Pro la metodika formado, la Studoj ricevas specialan rolon en la instruista trejnado. Ekde la studjaro 2007/08 realiĝas kunlaboro kun ILEI, kaj ĉiun trian jaron eblas aparte aliĝi al tiu ĉi specialiĝo. En la metodika kursaro, la studoj kunlaboras ankaŭ kun Edukado.net




Unusemajnaj intensaj sesioj (surlokaj kursoj de po 4 studobjektoj kaj ekzamenoj) okazas unufoje dum la semestro (fine de septembro kaj komence de februaro). Intertempe la gestudentoj laboras pri siaj taskoj hejme kaj rete, kaj ili ankaŭ konsultiĝas rete kun la prelegantoj. La gestudentoj pretigas diplomlaboraĵon, kaj post la fina ekzameno ricevos atestilon de UAM pri la plenumo de Interlingvistikaj Studoj.

Partoprenontoj povas aliĝi el la tuta mondo por la studjaroj 2017/2020 ĝis la 15-a de aŭgusto 2017. Pli frua anonco estas bonvena. La unua sesio okazos inter la 16 kaj la 22-a de septembro 2017. Postuloj : baza diplomo pri superagradaj studoj kaj bona scio de Esperanto. Partoprenontoj devas plenumi orientigan teston antaŭ la komenco de la Studoj, komence de la unua sesio.

Kotizo por unu semestro : 1850 PLN (ĉ. 460 EUR), reduktita al 700 PLN (ĉirkaŭ 175 EUR) por B-landoj. Kelkaj stipendioj (por la studkotizo) estas antaŭvidataj dank' al ESF (vi ankaŭ povas donaci al la programo AMU Poznanon de ESF por subteni la studojn : esperantic.org/amu).
Pliaj informoj kaj aliĝilo : amu.edu.pl/~interl ;
rete : interlin@amu.edu.pl.

# Esperanto in Berwick

Tiel nomiĝis la raporto, kiu aperis ĉe CBC Radio One (Berwick, Nov-Skotio) la 12-an de junio. Bob Williamson, la estro de la Bervika klubo kaj la estrarano de Kanada Esperanto-Asocio, kun kelkaj klubanoj, parolis pri Esperanto en Berwick kaj la propraj spertoj pri la lingvo kaj la Movado. jasonvermes.net/portfolio/story-esperanto-berwick

# Un Homme Qui Espère Encore




Se vi ankoraŭ ne spektis la 10-minutan videon kun Normando Fleury, la prezidanto de ESK, nepre faru tion ! La filmado okazis dum la pasintjara MeKaRo en Granby (2016), en la domo de Normando Fleury kaj Zdravka Metz en Granby kaj ankaŭ en Montrealo. La ĵurnalisto, Julien Moulin, mem sukcesis lerni Esperanton dum li laboris pri tiu ĉi projekto. youtu.be/j8jgflVoCcw

# KEA-stipendio por NOREK !

La Kanada Esperanto-Asocio (KEA) disponigas unu stipendion de ĝis 300 CAD al junul(in)o por ebligi partoprenon en la ĉi-jara Nord-Okcident-Regiona Esperanto-Konferenco (NOREK).

Ĉiu petanto (a) estu naskiĝinta la 1-an de januaro 1987 aŭ poste ; (b) estu Kanada daŭra loĝanto ; (c) estu membro de KEA : petoj de novaj membroj de KEA estas bonvenaj. Oni povas aliĝi ĉe esperanto.ca/eo/kea/membreco kaj tuj poste peti stipendion ; kaj (ĉ) sendu mesaĝon, en kiu oni pravigas sian peton, al mateo416@gmail.com, **ĝis la 22-a de aŭgusto 2017**.

Ni rekomendas ke oni priskribu siajn jamajn spertojn en Esperantujo, kaj ke oni skribu sian mesaĝon en Esperanto. Ni ne atendas ke via rego de Esperanto estu perfekta, do skribu sentime, sed Esperante ! Kutime malmultas la petoj, do ĉiu peto havas bonan ŝancon akceptiĝi.

NOREK 2017 okazos de la 22-a ĝis la 24-a de septembro en Victoria (BC) ; la kongresejo estos Paul's Motor Inn. Por ricevi informojn, registriĝi kaj proponi programerojn, sendu mesaĝon al norek2017.esperanto@gmail.com

# ESF nomis novan Ĉefdirektoron

**Esperantic Studies Foundation (ESF) nomis Charles O. Mays kiel sian novan Ĉefdirektoron ekde la 1-a de julio 2017. Lia antaŭulo, Joel Amis, eksiĝas por kompletigi siajn magistrajn studojn pri religio, survoje al pastriĝo en la Anglikana Eklezio de Kanado.**

Laŭprofesie Chuck Mays estas elektra inĝeniero kaj projektogvidisto. Li diplomiĝis pri elektra inĝenierado ĉe la Nord-Karolina Ŝtata Universitato.

En la daŭro de sia kariero, li pasigis longajn periodojn eksterlande, inkluzive unu jaron en Honkongo kaj dek jarojn en Aŭstralio. Lige kun sia profesio, li vaste vojaĝis en Eŭropo kaj Azio kaj ankaŭ vizitis Sud-Amerikon kaj Afrikon.



**Chuck Mays, la nova Ĉef-direktoro de ESF**

Chuck jam kelkajn jarojn aktivas en la aferoj de ESF. Interalie, li aranĝis multjaran sidejon por NASK, la Nord-Amerika Somera Kursaro, kiun ESF organizas ĉiujare, ĉe Universitato William Peace en Raleigh, Nord-Karolino. Li elektiĝis kiel estrarano de la Fondaĵo en 2013.

« Ni estas ja feliĉaj, ke ni trovis tiel multflanke spertan homon por okupi la streĉan postenon de Ĉefdirektoro, » diris la prezidanto de ESF Humphrey Tonkin. « Nia laboro subtene al lingva interkompreniĝo kaj esplorado daŭre vastiĝas, kaj Chuck alportos la ĝustan kombinon de klarvido, internaciismo kaj administra kompetento por teni superrigardon de tiu procezo. »

« ESF estas konata pro sia investado en la estonteco de Esperanto kaj lingva justeco ĝenerale per faka esplorado kaj progresemaj projektoj kiel NASK, Lernu.net kaj Edukado.net, » Mays rimarkis. « Mi ĝojas havi la okazon kunlabori kun bonega estraro en la rolo de Ĉefdirektoro dum ESF daŭrigas subvenciadon de gravaj esploroj kaj valoraj programoj kaj eventoj. »

« Ni bedaŭras noti la finon de la servado de Joel Amis, almenaŭ en lia nuna rolo, » Tonkin komentis. « Joel helpis fortigi ESF kaj pretigis nin por la venonta paŝo. Ni deziras al li ĉiun sukceson en la venonta stadio de liaj studoj kaj kariero. »


Joel Amis kun la episkopo de Montrealo, Mary Irwin-Gibson, kaj Ĵenja Amis

« Estis granda privilegio labori por ESF, » aldonis Joel Amis. « La profunda engaĝiĝo kun multfaceta organizaĵo ligita al la Esperanto-komunumo kaj kun la universitata medio min multflanke riĉigis. Kompreneble mi sentos la mankon de kunlaboro kun la talentaj, interesaj homoj en ESF — sed kvankam mia profesia kariero min gvidos laŭ alia vojo, mi daŭre restos entuziasma subtenanto kaj, laŭeble, kunlaboranto de ESF. Miajn plej sincerajn dankojn al ESF kaj la kolegoj ligitaj al ĝi, kaj miajn bondezirojn al Chuck Mays, en kies tre kapablajn manojn mi transdonas la administradon de la Fondaĵo. »

Per tiu nova enoficigo, la centro de agado de la Fondaĵo transiros el Montrealo, Kanado, al Raleigh, Nord-Karolino, Usono. Havante estraron el Usono kaj Kanado kaj tutmondan konsilantaron, Esperantic Studies Foundation laboras por antaŭenigi la komprenon kaj praktikon de lingva justeco en multkultura mondo. Per siaj subvencioj kaj aliaj agadoj, la Fondaĵo celas evoluigi kaj subteni la plej altajn normojn en esploroj, edukado kaj interlingva komunikado.

## Esperanto 130-jara !

Aŭskultu (france) la intervjuon kun Geoffrey Greatrex, vic-prezidanto de Kanada Esperanto-Asocio, pri Esperanto kaj tiu grava dato (je 7:50) ! ici.radio-canada.ca/premiere/emissions/Les-matins-d-ici/episodes/386280/audio-fil-du-mercredi-26-juillet-2017



# Forpasis Jean Sorel (1928-2017)

**« Por mi, la homo estas homo, ĉu blankulo, nigrulo aŭ ruĝulo, mi ne vidas la diferencon. » (Jean Sorel, el *Vivprotokoloj*, 1994)**

Jean Sorel, inter esperantistoj nomata Johano, naskiĝis blinda en Jacmel [ĵakmel] (Haitio) en 1928, sed la blindeco ne estis obstaklo por lia edukado, lernado, instruado, vivo, vojaĝoj, ŝatataj aktivecoj.

Lia patrino traktis lin egale kiel aliajn infanojn kaj li ne sentis sin malsama, sed tute egala al aliuloj. Jam trijara, Johano eniris lernejon por sidi en la klaso de sia fratino kaj lerni aŭskultante.

En Jacmel lia patrino renkontis francan kuraciston, kiu pro sia aĝo perdadis la vidpovon. Kiam li aŭdis pri Johano, la kuracisto mendis instrulibron el Francio por lernigi lin skribi kaj legi brajle. Johano estis unu el la unuaj lernantoj de iu privata lernejo por blinduloj en Haitio, kies programoj similis al tiuj de publikaj lernejoj. La problemo estis, ke la instrulibroj ne ekzistis brajle. Johano mem transkribadis historiajn aŭ geografiajn librojn laŭ ies legado el ordinaraj libroj.



Endome, la patrino parolis france kaj decidis instrui al siaj infanoj la anglan kaj hispanan. La kreolan li lernis ludante ĉe la strato kun aliaj infanoj kaj tiel li ekhavis intereson por la lingvoj. La familio havis kurt-ondan radio-aparaton, kaj Johano ĉiutage sidis kvar aŭ kvin horojn por aŭskulti radistaciojn el la tuta mondo, ĉefe anglajn kaj hispanajn.

Post la mezgrada lernejo li daŭrigis la studadon en Usono, en la ŝtato Masaĉuseco, en la plej malnova lernejo por blinduloj en la lando,

Perkyns School for the Blind (en Watertown) kaj en la urbeto Harvard, studante en la universitato Harvard por povi instrui al blindaj infanoj reveninte al Haitio. Tri jarojn poste li revenis Haitien kun diplomo de Pedagogia Fakultato.

En la ĉefurbo Portoprinco, Johano instruis al blindaj infanoj kaj ankaŭ al vidantaj instruistoj, kiuj specialiĝis pri laboro kun blinduloj. Samtempe li ekstudis juron kaj vespere laboris ĉe Radio Haïti. Ĝi estis ne nur radio por la tuta lando, sed oni povis aŭdi ĝin pere de kurt-ondaj radioj. Multaj haitianoj loĝantaj ekster la lando aŭskultadis ĝin regule. La radio estis tiutempe iuspeca scenejo, kie Johano estis aktoro. Foje lia voĉo devis esti ĝoja, aŭ male pli rapida aŭ ekscita. Tiam ne ekzistis televidiloj, do radio-aparatoj estis tio, kio ne nur devis transdoni informojn, sed, priskribante la eventojn, helpi la homan imagon.

Li ŝatis la laboron ĉe la radio, same kiel li ŝatis geamikojn kaj aparte la socian vivon. Tiu profunda emo renkonti la aliajn kaj havi komunan celon kaŭzis, ke li multe agis por fondi la unuan societon por blinduloj en Portoprinco kaj aliaj urbetoj en 1952.

Pro la politika situacio en Haitio en 1960, kiam diktatoris Duvalier, Johano ne plu volis vivi en Haitio. Li petis vizon por Usono, ĉar li sentis, ke li ne plu povas esprimi sian opinion libere. En 1964 li estis akceptita pro sia alta edukateco. Li alvenis Novjorkon, sed ne por longa tempo. Koresponda internacia lernejo, gvidata de la usona Instituo Hadley (Hadley Institute for the Blind and Visually Impaired, Winnetka, Ilinojso), proponis al Johano labori kiel perkoresponda korektanto por la angla kaj franca lingvoj en Montrealo. Samjare, Johano translokiĝs al Kanado.

En 1965 la direktoro de la internacia lernejo proponis al Johano ekstudi Esperanton pere de libro kaj kasedo dum tri monatoj. La ideo de internacia lingvo ne nur entuziasmigis lin, sed li ĝojis pri la ekzisto de la Montreala Esperanto-Klubo kaj Kanada Esperanto-Asocio, al kiuj li aliĝis. Li plezure partoprenis lokajn renkontiĝojn kaj landajn kongresojn.

La Universalan Kongreson Johano malkovris en la jaro 1971 en Britio, kaj li tuj ekŝatis tiele vojaĝi kaj viziti la mondon. Post tiu kongreso, li regule partoprenis ĉiujn krom tiuj, kiuj ne okazis samlande kiel la Esperantaj kongresoj por blinduloj. Por li « Esperanto-kongreso estas granda familia renkontiĝo. » Ne fondinte propran familion, geamikoj kaj samideanoj estis liaj familianoj. Li preferis kongresojn por blinduloj, ĉar

pli facilis « renkontiĝi kun ducent ol kun du mil homoj. »

La filozofio de Johano estis iuspeca realisma optimismo. De tie venis lia opinio pri diskriminacio : « ĝi ne povas tute malaperi, ĉar ĉiam estos iaj individuoj, kiuj pensos alimaniere. Sed mi esperas, ke la socio kun siaj plimultoj vivos kun respekto kaj toleremo. » Kiel enmigranto kaj handikapulo, li ekŝatis la ideon de la « Multetna asocio por la integriĝo de handikapitaj personoj ». Li estis unu el ĝiaj fondintoj kaj tuj aktivis kiel estrarano, foje reprezentante la Asocion ĉe radio aŭ gazetaro.

Li membriĝis ankaŭ en la Kanada Konsilio por blinduloj.

La ekzistanta haitia literatura klubo konis Johanon, kiu ne nur rilatis kun verkistoj, sed mem foje verkis kaj legis siajn poemojn.

Oni nomis lin helpanto de blinduloj en Haitio, ĉar li aĉetadis, kolektadis, riparigadis brajlajn maŝinojn, tajpilojn, bastonojn por marŝado, kaj poste li trovis manierojn sendi ilin al Haitio. Dum sia lasta translokiĝo, li decidis sendi dek ok kestojn da libroj brajle skribitaj al sia naskiĝlando. Post pli ol kvindek-jara helpo, senĉesa kaj senlaca laboro, Johano estis nomumita honora civitano de Portoprinco kaj Jacmel.

Pro aktiva socia vivo, li estis okupita per volontulaj laboroj kaj, post la emeritiĝo, la tagoj pasadis rapide. Li diris : « tro rapide por ĉion fari. Kiam ni iel helpas niajn homajn gefratojn, multfoje pli granda estos nia rekompenco. Do, homo estu bona, krea, pozitiva, helpema. Tiel mi vivas. Mi kvazaŭ havas iun ene de mi, kun kiu mi komunikas, kaj ofte dimanĉe mi iras preĝejon por preĝi, mediti kun la kredo, ke iuj enaj mesaĝoj realiĝos iun tagon ; kaj ke ne estu malsato, milito, kaj malaperu nejusteco ĉie en la mondo. Mi konscias, ke miaj pozitivaj ondoj kuniĝas kun ĉiuj homaj pozitivaj pensoj, kaj tiel la homoj vivos pli bone en la mondo. »

Johano multe ŝatis la spiritan liberecon, kiu baziĝis sur kredo kaj helpis lin esti granda optimisto, ridemulo kaj ŝercemulo. Ni ne forgesos lian laŭtan, sinceran kaj rekoneblan ridon. Johano estis preta helpi, mone aŭ age, por plenumi petitan deziron de iu frato-amiko.

Tiel ni memoros lin, kiu merite ripozas ekde la 17-a de aprilo 2017.

**Zdravka Metz**

# Floro

## *Ĥristina Kozlovska*

***Ĥristina Kozlovska (ukraine* Христина Козловська) *naskiĝis en 1989 en Ivano-Frankivska provinco de Ukrainio. Ŝi estas verkistino, poetino kaj ĵurnalistino. Ŝiaj diversaj verkoj estas tradukitaj en Esperanton de Petro Palivoda, kaj ili aperis en diversaj Esperantaj revuoj.***

Kaj ĉio komenciĝis tute ne banale, ne tiel, kiel ĉe la plimulto de la homoj. Ne pro la deziro donaci neprofiteme al iuj amon kaj zorgadon kaj same akcepti ilian amon kaj zorgadon. Ĉar delonge venis al ŝi kompreno, ke sen ŝia amo haltos nek la mondo, nek la koro de eĉ un persono. Ĝis nun ŝi ne havis okazon renkonti homojn, kiuj postulus de ŝi tiun amon. Kaj interna nekomprenebla, probable denaska asketismo ne permesis al ŝi vidi bezonon je aĵoj aŭ sentoj, kiujn ŝi ĝis nun tute ne bezonis. Sekve temis pri io alia, multe pli pragmata. Temis pri helpo, antaŭ ĉio al si mem, kaj poste ankaŭ pri oportuna kunekzistado. Sed



***Pi valora ol oro*: La originala kovrilo de la libro, kie aperis tiu ĉi rakonto**

komence estis artikolo en loka gazeto.

*Kiel katoj kuracas homojn*

*… ili povas ĝuste determini malsanan lokon de homo kaj sanigi ĝin… kuŝiĝas sur malsanan korpoparton, varmigas kaj masaĝas ĝin… kreas specialan energian fonon… senigas je depresio, sendormeco, hipertensio, artrito kaj eĉ infarkto, … kuracas ginekologiajn malsanojn kaj problemojn de la spirsistemo… kontribuas al pli rapida cikatriĝo de vundoj, forigas kapdolorojn…*

Ŝi simple fiksrigardis la artikolon

legante la liniojn kun la listo de malsanoj, kiujn tiel facile povas kuraci simpla kato, kaj nur flugrigardis tiujn liniojn, kie temis pri la amo, kiun tiuj bestoj donacas al siaj mastroj, kaj pri tio, ke tiu kuracado okazas plej probable sur la psikologia nivelo, kaj ke tiu longa kaj klopoda procezo dependas ankaŭ de la mastro, kiu devas agordi sian kontakton kun la besto, se eblas tiel diri, fidi ĝin. Tiuj lokoj en la teksto pri amo ŝi perceptis kiel ĝeneralan fonon de ceteraj gravaj faktoj. Ŝajnis, ke « amon » homoj enŝovas ien ajn por fuŝmiksi la tekston ŝtopitan per datoj kaj eventoj, eble por ke ĝi ne ŝajnu tro malfacila por legado kaj posta asimilado (digestado ?). Iom simile al tio, kiel oni trinkas akvon post solida nutraĵo por ne glutsufokiĝi. Kompreneble, akvo estas vivonecesa, oni ĝin ĉiam bezonos, tamen ĝi ja estas tiom… tiom seneca, sen odoro kaj sen gusto. Amo por Nina estis akvo. Amo estas io sen odoro kaj gusto. En sia vivo ŝi neniam rimarkis ĝin. Sed eble amo falis sur ŝin kiel pluvo per etaj porcioj ? Sed tiam amo estis ensorbita de ŝia korpo, kaj Nina denove nenie rimarkis ĝin. Tamen Nina jam kutimiĝis al tio, ke homoj ofte agas tiamaniere rilate al amo, provas profiti de ĝi. Tial ĉion gravan por si en la artikolo ŝi ekvidis, kaj la negravan ekvidis kaj forgesis.

Jam sekvatage Nina iris hejmen ne sola. Enkorbe kuŝis silentiĝinta timigita katino. Plenkreska individuo, neniuokaze katido. Nina ne havis eĉ plej etan deziron klopodi ĉirkaŭ la katido, manĝigante ĝin el boteleto, lernigi al ĝi ekskrementi en la sablon kaj, Dio gardu, ludi kun ĝi aŭ ĝenerale dediĉi al ĝi pli da atento ol necesas por kvieta kaj paca loĝado sur komuna teritorio. Do ŝi trovis tion, kion ŝi volis — jam ne junan katinon, kiun ne plu favoris ŝia mastrino, amikino de Nina, aŭ, pli ĝuste, kolegino. La katino jam delonge ĉesis esti freneza amuza kreitaĵo, kiu tutajn tagojn kuradis tien kaj reen tra la loĝejo, gratis tapetojn, pendiĝis sur kurtenoj, amuzante per tio la domloĝantojn ; anstataŭe ĝi estis trankvila, indiferenta, iomete pigra kaj, kiel ŝajnis al ĉiuj, maljuna.

Survoje Nina vizitis vendejon kaj aĉetis senelekte iun katan nutraĵon, pretiĝante por plej malbonaj situacioj. La virino jam imagis al si terurajn bildojn de nekredebla sopiro de la besto al sia ĝisnuna hejmo, al ŝi ŝajnis, ke ŝi jam aŭdas akran senesperan katan hurladon, kaj ŝi eĉ supozis, ke finfine ŝi devos redoni la katinon.

Sed la vivo komencis donaci al Nina siajn misterojn. Komence donaci kaj poste jam malkovri ilin. Kaj la unua mistero iĝis Floro. Tiel

nomiĝis la katino, kiun Nina ĝuste nun estis portanta en sia korbo en la loĝejon. Tiel ĝi nomiĝis denaske, kaj en la kapon de Nina neniam venus la penso nomi la katinon alie. Unue, Nina estis nekreema homo. Ŝia nekreemo atingis tiajn altaĵojn, ke simple elpensi nomon por la katinjo kaŭzis neimageblajn mensajn suferojn. Kompreneble, al ŝi venis la penso pri io simila al Ronrona, kaj Ronrona ĉiam kaj ĉie asociiĝis kun infanverseto pri Katinjo Ronrona (kie vi estis…) kaj pro tio ŝiaj suferoj eĉ pli intensiĝis. La virino ne ŝatis rememori sian infanecon.

Nina elkorbigis la katinon kaj mem sidiĝis en la malgranda kuirĉambreto. Ŝi rigardis vake, frotante sian dekstran genuon, kiu ankoraŭ survoje ekbrulis. Kaj ferminte la okulojn ŝi falis tra kelkaj etaĝoj en varman sukan someron, kiu estis plena de varmaj sukaj pomoj en la ĝardeno de ŝia avo. Jen estas la pomarboj de la avo, kaj jen la najbaraj, kaj kiu dubus, ke sur la najbaraj pomarboj la pomoj estas pli bongustaj. Jen estas la barilo inter la ĝardenoj, kaj jen super la barilo estas ŝi, ruĝa longkrura bubino — ŝi staras sur la maldika branĉo, tenas sin per ankoraŭ pli maldika maneto je alia branĉo, kaj per la dua tiras sin al tiuj pli bongustaj pomoj. Kaj tiam okazis tio, kio devas okazi en ĉiu paradizo, eĉ pli, se temas pri pomoj. Poste estis dolore kaj estis larmoj. Kaj la najbaraj knaboj ridegis ankoraŭ daŭre, vidante ŝian sportpantalonon, kiu minacis malkudriĝi, tirite sur gipsobandaĝon sur la dekstra kruro. Kaj ĝuste la dekstra kruro, kaj pli ĝuste la dekstra genuo, reaganta al ĉiuj veterŝanĝoj, estis destinita al Floro, al ĝiaj nekredeblaj kurackvalitoj.

Sed tempo pasis, la genudoloro ne ĉesis, kaj la katino plu sidis sur sia loko kaj ŝajnis jam dormeti. Nur nun Nina ekkonsciis pri la ridindeco de la situacio. Kiel povis ŝi, adolta virino, kredi la artikolon, kiu ŝajne estis destinita nur por okupi superfluan spacon sur la paĝo ? Sed tamen Nina decidis provi alian varianton. Eble Floro sidas simple tro malproksime kaj ne sentas iujn tiajn ondojn, kiuj devus eliri de la malsana loko ? Nina prenis la katinon kaj sursofigis ĝin apud si. Kaj poste — sur sian malsanan genuon. Floro dum kelkaj sekundoj vere ne moviĝis, sed poste trankvile stariĝis kaj kuŝiĝis, fleksinte sub si la krurojn sur la soforando plej fora de Nina.

Tiun tagon Nina sentis sin tre amare. Ŝi metis sur tiun katoterapion sian lastan esperon por resaniĝo. Nu, se ne por resaniĝo, do almenaŭ por dolorkvietiĝo, sed ĉio montriĝis vana. Jen tiel ili sidis, ĉiu en sia angulo, du solecaj estaĵoj, indiferentaj por ĉiuj kaj indiferentaj al ĉio kaj dume indiferentaj unu al la alia.

***

Printempo jam delonge memorigis pri si, sed ne per verdaj folioj ekster la fenestro, ne per odoro de floroj, ne per kantado de birdoj. Ne, en ŝia urbo kiel la unuaj pri la printempo komencis paroli muroj. Post kelkaj pluvegoj printempo ŝtelpenetris la vestoriparejon per grizaj malpuraj ŝimomakuloj, kaj tiu printempo odoris tute ne romantike kaj ne helpis la disvastigadon de fluidoj sur reprezentantojn de la malsama sekso. Do Nina plu sidis ĉe la fenestro sole, plene profundiĝinte en sian laboron. Se antaŭe iu el viroj havis okazon viziti por nelonge ilian atelieron, ili turnis sian atenton al Nina ne pli ol al malriĉa meblaro. Malnova seĝo, sur kiu ili kutime sidiĝis, vekis ĉe ili pli da intereso. Sed tio tute ne koncernis Nina-n, kaj ĝenerale malmulto koncernis ŝin en tiu ĉambro. Ŝiaj oreloj foje kaptis iajn strangajn aŭ laŭtajn sonojn venantajn de la strato tra la putraj fenestroj, sed mense ŝi delonge estis hejme. Nina pense revenis hejmen tuj, kiam ŝi venis al sia laborloko. Nun ŝia hejmo estis ja ne nur malgranda unuĉambra loĝejo, nun vivis en ĉi loĝejo iu, kiu atendis ŝin. Kaj tiu estis Floro.

La virino ne rimarkis, kiel ĉio okazis. Kiel okazis, ke tiu estajo eksignifis por ŝi pli ol ĝi devus. Nina rimarkis, ke ŝi ĝojas pri ĝia ĉeesto pli ol pri ĉeesto de ajna persono en sia vivo. Kaj tio tute ne timigis la virinon. Male, nun malmulto ŝin timigis. Ŝi sentis trankvilon ĉiumatene, kiam ŝi vekiĝis kaj vidis apud si Floron. Kaj ankoraŭ ŝi sentis trankvilon, kiam ŝi nokte ekdormis kaj aŭdis, kiel sur ŝian rufan hararon, disĵetitan surkusene, kuŝiĝis same rufa Floro kaj verŝajne kunfandiĝis kun ĝi. Nina eĉ provis imagi, kiel amuze tio povus aspekti. Kaj Nina sciis ankoraŭ, ke, apenaŭ ŝi venas de ekstere en la porĉon, Floro saltas de la sofo aŭ seĝo, kuras al la enirpordo de ilia loĝejo sur la kvina etaĝo kaj jam nenien de ĝi deiras, ĝis kiam ĝi finfine renkontos ŝin, Nina-n.

Kaj Nina vere vidis la katinon ĉiufoje, kiam ŝi malfermis la pordon. Ŝi ĵetis siajn sakojn kaj antaŭ ĉio prenis Floron en siajn brakojn. Kaj tiel estis ĉiutage, dum multaj tagoj, multaj monatoj. Nina ne maltrankviliĝis, ke jam tiel longe ŝi estas infane alligita al la besto, ke ŝi en sia vivo neniun plu serĉas, nek bezonas. Ŝi simple eĉ ne unufoje pensis, ke homoj ne povas esti tiaj kiel bestoj — simple ami, sendepende de io.

Nun printempe la malsana genuo ĉiam pli tedis Nina-n, ĝi doloris kvazaŭ tordate tiel, kiel post lavado oni tordelpremas malsekajn vestaĵojn. Foje tiu teda doloro forprenis ĉiujn fortojn. Ŝi povis fari nenion, nur sidis kaj frotis sian genuon per

diversaj ungventoj, kiuj ja helpis, sed ne por longe. La tutan tempon Nina pacience atendis, ke Floro iam aliros kaj tamen kuŝiĝos sur la malsanan lokon kaj tiam ŝi ne plu devos fari tiujn sensencajn procedurojn kun medikamentoj. Sed Floro, kio estis sufiĉe strange, neniam faris tion. Iam (Nina jam ne memoris kiam kaj kie) ŝi aŭdis, ke katoj sentas, kiam al homo estas vere malbone, kaj nur tiam helpas. Nina pensis, ke jen nun estas tiu momento, ĝuste nun al ŝi estas tre dolore kaj ĝuste nun ŝi kiel neniam bezonas helpon. Sed helpo ne venis de ie, do al Nina nenio plu restis ol simple plu atendi. Kaj ŝi atendis.

— Nina, vi ja estas strangulino — diris Maria, kolegino de Nina, kiun ial incitis tia, laŭ ŝia opinio, malsaneca alligiteco al la besto. — Vi devas krei familion, ekhavi infanojn. Finfine, vi bezonas homon, sed ne katon.

— Sed mi ofte ne komprenas homojn — naive respondis Nina. — Sed katinoj… ili estas multe pli simplaj, ili…

— Sed vi estas ja homo, Nina, vi estas virino, kaj por virino estas eĉ pli grave, nekredeble grave ne esti sola. Ĉar esti sola dum maljuneco estas neelteneble, kaj maljuneco ne estas tiel malproksima.

— Sed mi ja ne estas sola, Maria, kaj maljuneco, mi opinias, ne estas tiel timinda.

Maria ne sciis, kion ŝi povas respondi al tiuj lastaj vortoj de Nina, do, lasinte ŝin agi laŭ sia bontrovo, ŝi reekokupis sin pri sia laboro.

Kaj Nina vere ne tre timis maljunecon, kaj eble tute ne timis ĝin. Ja kial homoj timas maljunecon ? Antaŭ ĉio ili timas ŝanĝojn. Ili timas, ke post ĝia alveno io ŝanĝiĝos definitive. Sed la vivo de Nina estis ĉiam egalritma kaj monotona, ĝi fluadis per homogena maso tra ŝia viva, tute rekta (ne kurba, kiel estas kutime dirate en paroladoj dum studfinaj festoj) vojo, kolorigante ĉion ĉiam neŭtralkolore. Ŝiaj infanaĝaj ambicioj ne tro diferencis de la ambicioj de juneco, kaj tiuj siavice, de la ambicioj de matura virino. Kaj samtempe ŝi ne estis infaneca, naiva aŭ sensprita. Simple ekde infanaĝo ŝi alkutimiĝis ne nutri sin per ĥimeraj iluzioj, ne kombini fantaziajn planojn, ne aspiri al io tre forte. Nina scipovis esti simpla en ĉio. Ŝi estis simpla en rilatoj kun homoj, en rilatoj kun la vivo. Ŝi neniam postulis de ĝi ion pli grandan ol ĝi estis donanta al ŝi ĉi-momente kaj samtempe volis, ke ankaŭ la vivo rilatu al ŝi same.

Nina ne ŝatis elprovi la sorton, ŝi ne ŝatis eĉ aŭskulti pri fremdaj elprovoj. Iufoje ŝi pensis, ke eble tiuj homoj estas mem kulpaj pri siaj

problemoj, ĉar, kiam vi petas la vivon pri io pli granda, tiam ĝi povas postuli de vi la samon. Do la infanaĝo de Nina transfluiĝis tiel glate, tiel nerimarkeble en la junecon, ke ŝi ŝajnis esti ĉiam unulino kaj nam knabino. Kaj poste same alvenis matureco, kaj nun ŝi ŝajnis esti ĉiam virino kaj neniam junulino. Kaj la samon ŝi atendis de maljuneco. Pli ĝuste, Nina sciis, ke nenio ŝanĝiĝos, ŝi estos la sama, kaj ĉio ĉirkaŭe restos la sama, almenaŭ sur ŝia teritorio, en ŝia loĝejo. Nina scipovis ĝoji pri la hodiaŭa tago, ŝi ĝojis pri florantaj arboj, varmaj matenoj, kiujn ĉiam pli ofte anstataŭigis la malvarmaj, bongusta manĝaĵo, bonaj filmoj, sed pleje Nina ĝojis pri la ĉeesto de Floro. Ŝi apenaŭ povis imagi la vivon sen ĝia lanuga varma korpeto sur ŝiaj brakoj. Kaj, kio estis plej grava, Nina mem sentis, kiel Floro bezonas ŝin, kiom grava ŝi estas por ĝi.

***

Li estis sufiĉe alloga, kvankam jam delonge ne juna viro. Malrapidaj, iom pigraj movoj, facileta frapetado per fingroj sur la tablo, tutnova, gladita kostumo — ĉio atestis, ke li ne kutimas tumulti, sed kutimas, ke ĉiuj tumultas ĉirkaŭ li kaj komplezas lin. Kaj li mem ŝajne ŝatis komplezi sin. Li sidis enpensiĝinte kaj krucinte la krurojn. Nina plurfoje timeme rigardis la viron de sia sidloko. Poste ŝi ne povos rememori, por kio li venis al ilia vestoriparejo, eble por refaldi pantalonon, aŭ eble ne. Sed ĉi tio ne gravis, estis nur grave, ke li tamen estis tie. Kaj simple atendi sur sia seĝo ne sufiĉis por li, do li decidis ekparoli. Kaj li ekparolis al Nina.

— Bona vetero estas hodiaŭ, ĝi, laŭ mi, estas la unua vere varma tago printempe.

Komence Nina ne intencis respondi, ĉar ŝi simple ne komprenis, ke tiuj vortoj estis adresitaj al ŝi. Sed post kelkaj sekundoj de profunda silento ŝi tamen levis siajn okulojn de kudrado kaj ĉirkaŭrigardis la ĉambron. Kial neniu respondas al li ? — pensis la virino, serĉante per la okuloj siajn koleginojn. Ŝi tre esperis ekvidi tie almenaŭ iun alian krom si mem kaj tiu sinjoro, kiu ial rigardis ŝin. Kaj kiam Nina rimarkis, ke ili estas en la kudrejo solaj, ŝin kaptis ia stranga ekscitiĝo. Ŝi sentis, kiel sango ĵetiĝis en ŝian vizaĝon kaj ŝiaj manoj ekŝvitis. Ŝi tiom profundiĝis en siajn pensojn, ke ŝi simple ne rimarkis, ke du kudristinoj, kiuj hodiaŭ laboras kun ŝi, ien eliris. Ŝi tre deziris nun, ke ili revenu baldaŭ. Sed estis kvazaŭ tiujn du, bedaŭrinde, la tero englutis. Kaj, kvankam la viro sidis ne apud ŝi, sed ĉe la najbara tablo, tamen Nina sentis la odoron de lia parfumo kaj maltrankviliĝis pro tio eĉ pli. Ŝi simple ne havis

alian eliron.

Ŝi rigardis lin, ne havante eĉ plej etan ideon, kion ŝi povus respondi al li. Jes, la vetero estas bona, la tago estas vere varma, do kio ? Nina neniam komprenis, kiel oni povas paroli pri la vetero. Ŝi ne apartenis al tiuj, kiuj parolas por ne silenti. Ne, ŝi ne estis iu hom-evitulino, ŝi simple ŝatis paroli, kiam tio vere necesis. Sincerdire, Nina ne sciis lerte komunikiĝi kun tiaj sinjoroj en belaj kostumoj, kun tiaj flegitaj, jam grizetaj barboj. Nina ĝis nun nenion respondis. Ŝi jam ekpensis, ke ĉio eble iel pasos. Sed la sinjoro ne intencis lasi ŝin en paco.

— Vi estas bonŝanca, ke vi sidas ĉe la fenestro ; el ĝi, verŝajne, malfermiĝas belega vidaĵo eksteren.

La viro ridetis al Nina, ŝi siavice kapjesis, sentante, kiel flamas ŝiaj vangoj.

— Ĉu vi scias, sinjorino… — li rigardis demande el sub siaj vitretoj al Nina, kaj tiam ŝi jam ne konfuziĝis.

— Nina — ŝi diris per apenaŭ aŭdebla voĉo.

— Do, sinjorino Nina, ĉu vi scias, ke nome tiu strato, jen tiu, kiu estas ekster via fenestro kaj en kiu vi havas la feliĉon labori, estas unu el la plej malnovaj stratoj de nia urbo ? — Li sidis flanke al la tablo, sin apogante al la dorso de malnova seĝo. Lia maldekstra mano estis en la poŝo, kaj la dekstra ludis kun liniilo, kiu antaŭ tiu momento kuŝis sur la tablo.

— Mi ne sciis — ŝi kapneis, daŭrigante sian laboron.

Li ŝajnas esti iu profesoro, pensis Nina. Ŝi ne sciis certe, sed ĝuste tia devis esti en ŝia imago vera profesoro aŭ doktoro pri sciencoj, aŭ iu ajn el tiuj doktaj respektataj viroj.

— Iam ĉi tie troviĝis la unua poŝtejo, la unua teatro. Ho, se vi nur scius, kiom grava estis tiam teatro por la urbanoj ! Vespere homoj kunvenis ĉi tien el ĉiuj partoj de la urbo. — Lia voĉo tre sonoris en tiu granda kaj duonmalplena ĉambro. Ĝi eĥiĝis de la nudaj muroj kaj plenigis la tutan spacon. La viro svingis la liniilon kiel dirigento bastonon, kaj nun al Nina ŝajnis, ke tiu sinjoro tute ne estas profesoro, sed plej verŝajne aktoro, konata teatra aktoro. Kaj ju pli atente li rigardis Nina-n, des pli ofte ŝajnis al ŝi, ke io perturbas ŝin. Ŝi senĉese ordigadis sian ruĝan lanugan hararon, kiu konstante elpingliĝis, tiradis malsupren la manikojn, kiuj ĉiam sur ĉiuj vestoj estis tro mallongaj por ŝiaj longaj maldikaj brakoj.

— Kaj al vi, sinjorino Nina, kiu arto plaĉas pleje ?

Liaj okuloj brilis, sed ĉu eble al Nina nur ŝajnis tiel, kaj fakte brilis liaj okulvitroj ?

La virino respondis la veron, ne detirante siajn okulojn de la kudromaŝino :

— Mi ne scias — Nina hontis pro sia respondo. Antaŭe ŝi neniam ĝeniĝus pro tiaj bagateloj, sed ial nun ŝi ŝatus diri ion pli saĝan.

— A-ha-hah, — la viro ekridis — vi pravas, sinjorino Nina, ni forgesu pri arto. Diru al mi prefere ion alian ? Nu… ekzemple, kiun okupon vi ŝatas hejme, en via libertempo ?

Al tiu demando Nina jam konis la respondon, sendube Floro estas ŝia ŝatokupo.

— Hejme mi prizorgas mian katinon.

— Ho, kiel ĉarme tio estas… — La viro denove ridetis, al Nina eĉ ŝajnis, ke ŝi aŭdis iun maliceton en lia voĉo. — Kaj kiel ĝi nomiĝas ?

— Floro.

— Vi scias, iam mi faris unu esploron pri tiu temo kaj klarigis, ke la virinoj de via aĝo estas la plej emaj al korinklino al bestoj.

Tio embarasis iomete Nina-n, ŝi eĉ opiniis, ke ŝi vane ekparolis pri tiu temo.

— Mi simple amas mian Floron, kaj ŝi amas min.

La viro lasis la liniilon kaj nun atente rigardis Nina-n.

— Mia karulino, mi bedaŭras disrevigi vin, sed mi devas fari tion. La afero konsistas en tio, ke katoj kaj bestoj ĝenerale ne scipovas ami. Ili ne estas kulpaj pri tio, simple tia estas ilia naturo.

Ankaŭ Nina lasis sian laboron kaj turnis sin al la viro. Kiel li povis tiel rapide trovi ŝian la plej tiklan punkton ? Nina iĝis malgajhumora, ŝin absolute indignigis liaj lastaj vortoj. Nina komencis defendi sin, ĉar la nekonato atencis ion tre valoran por ŝi.

— Kiel vi povas koni la naturon ĝuste de mia Floro ? Vi ne scias, pri kio vi parolas !

— Ĉio estas tre simpla, ĉiuj katinoj estas la samaj.

— Ne, ili ne estas la samaj. Se vi vidus, kiel ĝi renkontas min, kiam mi alvenas de la laboro, kiel karese ĝi alpremiĝas al mi, kiam al mi estas malbone, vi ne dirus tion. Mia Floro amas min, kiel neniu alia.

— Sinjorino Nina, mi havas akademian titolon en psikologio, do kredu min, mi scias, pri kio mi parolas. Bestoj ne povas ami, ĉe ili forestas memkonscio. Memkonscio estas termino indikanta operacion, per kiu homo perceptas sin.

Dank' al ĝi homo ne nur komprenas la eventojn, kiuj okazas al li aŭ ŝi, kiel tion faras aliaj vivantaj estaĵoj, sed ankaŭ povas analizi ilin. Kiam homo amas, li aŭ ŝi konscias tion.

— Sed ĉu mia katinjo kondutus tiel, se ĝi ne amus min ? Kiel do oni povas klarigi tion ? — Nina ankoraŭ insistis, kvankam ŝia voĉo ne plu estis tiel certa.

— Bestoj posedas konojn de refleksa naturo, sed ili eĉ ne konscias tiun konon. Ili ne havas amon kiel tian, estas nur alligiteco, nur kutimo. Se sur via loko estus alia homo, via, uh… Floro, se mi ne eraras, kondukus same kun li aŭ ŝi. Ĝi same kurus al la pordo, kiam ŝi malfermus ĝin, ĉar ĝi scius, ke ĝia mastrino nun donos al ĝi manĝaĵon. Ĝi same frotiĝus kontraŭ kruro de tiu alia, ĉar ĝi alkutimiĝis, ke post tio ĝi estas karesata. Tio estas ĉio. Ne serĉu romantikon tie, kie ĝi ne povas esti.

La viro denove ekokupis sin pri la liniilo. Li frapetis per ĝi la tablon, kaj lia tuta aspekto, lia apenaŭ videbla rideto parolis pri tio, ke li estas evidente kontenta pri siaj vortoj. Nina havis neniun ŝancon en tiu lukto. Li havis malantaŭ si sciencon, ŝi havis nur siajn proprajn konvinkojn, kaj eĉ tiuj evidentiĝis ja ne tiel firmaj. Nun la virino silentis, simple rigardadis siajn manojn. Nina ne ofendiĝis, nur sentis sin sufiĉe deprimita por arogi al si ne respondi al liaj lastaj vortoj. La viro rimarkis ŝanĝojn sur ŝia vizaĝo, kaj li rimarkis ankaŭ ŝian klaran profilon, tiel helan, preskaŭ travideblan, kaj ankoraŭ junan haŭton kovritan de efelidoj. Ŝi sidis ĉe la fenestro, tute kadrita de lumo kaj en iu momento ŝi ekŝajnis al li, ne, ne bela — sankta, pura kaj senpeka. Li tiel volis tuŝi ŝian manon ! Kaj, ĉar li neniam rifuzis al si la plezuron de amoraj aventuroj, do sen pensi longe, li ĵetis sin al ŝiaj piedoj.

— Ho mia karulino, ĉu mi povas nomi vin simple Nina ? — kaj, ne atendante ĝis la respondo, pluigis : — Ne malĝoju tiel, amo ekzistas, kaj iufoje evidentiĝas, ke ĝi estas tute proksime, tute apude, oni nur bezonas scii, kien rigardi.

Li diris ĉion ĉi, kaŭriĝinte apud la genuoj de Nina kaj kunpremante firme ŝian tremantan manon. Nina tiom ektimis tiun subitan atakon, ke ŝi ne tuj komprenis, kio okazas, kaj, kiam ŝi komencis elŝiri la manon, evidentiĝis, ke estas tro malfrue. Li tenis ĝin per siaj varmegaj polmoj kaj plurfoje tuŝis ĝin per siaj lipoj. Nur antaŭ nelonge Nina estis tiel malĝojigita. Ŝin maltrankviligis la vortoj diritaj de la sinjoro. Ie en sia animo ŝi eĉ komencis koleri pri li, ĉar li kuraĝis atenci la plej karan — Floron, ŝian teneran, amantan katinjon. Ankoraŭ antaŭ kelkaj minutoj ŝi kapablus eĉ respondi akre

al li por silentigi lin, sed nun… nun Nina ne povis eĉ analizi siajn pensojn, la ĉambro turniĝis kaj, se la virino nun starus, ŝi simple ne tenus sin sur la piedoj. Nun ŝi eksentis lian manon ankaŭ sur sia genuo.

Al ŝi ŝajnis, ke ŝi deziras, ke li ĉesu, sed kial do ŝi ankoraŭ diris al li nenion, ne ĉesigis tion tutan ? Nina sidis sur sia seĝo ĉe la kudromaŝino kaj eĉ timis movi sin, timis enspiri kaj elspiri, timis rigardi lin. La sinjoro diris al ŝi, kiel bela ŝi estas kaj kiel delikata estas ŝia haŭto. Sed Nina, kiu preskaŭ ne aŭdis, ne povis kredi, ke ĉio ĉi okazas al ŝi. La sinjoro evidente ŝatis tiun ludon, li murmuris ion, rigardis Nina-n la tutan tempon de sub siaj vitretoj, sentis, ke lia emeritaĝa karno estas tiel juna kiel lia animo, kaj estis feliĉa. Nina tuta tremis, eble unuafoje dum tiom multaj jaroj ŝi sentis sin virino kaj ankaŭ estis feliĉa. Sed tiu eksplodo de emocioj, eksplodo de ambaŭ iliaj tiel malsamaj feliĉoj daŭris tute ne longe. En la koridoro aŭdiĝis paŝoj kaj poste ankaŭ voĉoj, kaj ili alproksimiĝis. Ili ambaŭ komprenis, kio okazas.

Nina etendiĝis en sia seĝo kaj moviĝis ankoraŭ pli proksimen al la tablo, penante egaligi sian spiradon, kaj la viro surpiediĝis, laŭte ekĝemante — ŝajne lia dorso ekdoloris — kaj jam apud ŝia orelo anhelante flustris ion. Nina povis kompreni nur kelkajn lastajn vortojn : morgaŭ je la dudeka ĉe la monumento de Mickiewicz, sed tio sufiĉis al ŝi por kompreni, pri kio temas.

Ekde la reveno de la laborantinoj al la kudrejo Nina ne kuraĝis almenaŭ ankoraŭfoje rigardi lin. Ŝi aŭdis nur mallongan « dankon » kaj frapon de la pordo, kiu fermiĝis post li. Nur tiam Nina apogis sin al la dorso de sia seĝo kaj tro longe rigardadis la fenestron. La virinoj eĉ interŝanĝis rigardojn, montrante unu al la alia la rigidiĝintan figuron de Nina, por kiu stato de revemeco estis eksterordinare malofta, kaj sensone ekhihiis. Sed Nina plue rigardadis la pasantojn, la malnovajn grizajn domojn kaj pensis, ke tiu strato estas vere tre bona kaj verŝajne vere pratempa.

El la malnova pola domo, elspiranta humidon kaj malvarmon, la sinjoro aperis sur la superplena strato, inundita de agrablaj printempaj radioj, deskuis sian ankaŭ sen tio perfektan kostumon kaj kun miro komencis rememori ĉion, kio ĵus okazis al li. Liaj manoj poiome ĉesis tremi kaj la antaŭnelonge ardiĝinta vizaĝo estis revenanta al sia normala stato. Kio ĝi estis ? Kaj kial ĝuste tiu virino ? Nun la sinjoro neniel povis rememori, kio ĝuste tiel logis lin en ŝia aspekto. Li rerigardis la grizan konstruaĵon malantaŭ sia dorso kaj skuinte la kapon rapidis al la kunveno, pri kiu li ial tute

forgesis kaj al kiu li jam sufiĉe malfruiĝis.

***

Nina sidis surbenke kaj klakis per la dentoj pro malvarmo, desupre rigardis ŝin severe Mickiewicz mem, kvazaŭ malaprobante pro ŝia vesto tro leĝera por tia venta vetero. Sed kion povis fari Nina ? Ŝi simple ne povis surmeti ion alian, ol sian solan robon, kiu ne estis elŝrankigata dum kelkaj jaroj. Por almenaŭ iomete varmiĝi, ŝi frotis siajn akrajn genuojn, apenaŭ kovritajn per sinteza robo, kaj kunfrapis la kalkanumetojn de ŝuoj speciale aĉetitaj por tiu okazo. Ŝi surmetis orajn orelringojn kaj oran ĉeneton kun kruceto, ŝminkis la lipojn, kio jam estis por ŝi tro multe da kosmetikaĵo sur la vizaĝo, kaj nun al ŝi ŝajnis, ke ĉiuj rigardas ŝin. Nina estus delonge translokiĝinta al la plej malproksima benko, kiu estas kaŝita ie malantaŭ siringaj arbustoj, se ŝi ne timus, ke li ne vidos ŝin tie. Ŝi estis veninta kvin minutojn pli frue, ŝi ŝatis ĉien alveni ĝustatempe, kaj pri tio, ke virino devus malfruiĝi al rendevuo, ŝi ne sciis, ĉar ŝi simple neniam iris al rendevuoj. Do ŝi havis ankoraŭ iom da tempo por profundiĝi en siajn pensojn. Nina denove rememoris ilian hieraŭan konversacion kaj pensis, ke li fakte pravas. Bestoj neniam egaliĝos al homoj. Nur homoj povas kunsenti, pardoni, amiki. Nur homo povas tiel pasie kaj sindone ami, ami dum la tuta vivo. Nina ne povis scii certe, ĉar ŝi neniam iun en sia vivo tiel amis, kaj neniu amis ŝin tiel, sed nun ŝi sentis, ke baldaŭ ĉio ĉi okazos al ŝi. Unuafoje ŝi deziris tion. Hieraŭ, veninte hejmen de laboro, ŝi iel tute alie rigardis sian Floron. Ne, Nina ne intencis seniĝi de sia katinjo, simple nur hieraŭ ŝi komprenis, ke ŝia tuta katronrona amo estas malvera. Eble Floro estis iam same alkuranta al sia antaŭa mastrino, kaj post Nina ĝi alkurus ankoraŭ al iu alia. Tiuvespere Nina spektis televidon sen Floro, ŝi ne surbrakigis la katinon, ne kuŝiĝis kun ĝi sur la sofo, ne aŭskultis ĝian ronronadon. Tiunokte Nina pensis pri la morgaŭa renkontiĝo ĉe Mickiewicz kaj longan tempon ne povis endormiĝi.

Kaj jen ŝi estas ĉi tie ĉe la monumento sur la benko plej proksima al la monumento, tremante pro la malvarma vento, kaj la viro ĝis nun ne estas tie. Nina ekrigardis la horloĝon, jam estis dudek post la oka, sed ŝi eĉ ne pensis koleri, ŝi sciis, ke en granda urbo al homoj povas okazi diversaj incidentoj, ŝi tuj pensis pri malbone funkcianta transporto, pri kavoj sur la vojoj, pri problemoj en la laborloko kaj ankoraŭ pri multo. Ŝi trovis dekojn da senkulpigoj pro lia malfruiĝo. Sed ju pli la horloĝmontrilo proksimiĝis al la naŭa, des malpli multiĝis la listo de senkulpigoj, kaj, kiam tiu

montrilo estis jam sur la deka, la senkulpigoj tute finiĝis. Nina leviĝis de la benko kaj forlasis la placon de Mickiewicz. Neniam plu ŝi renkontis la sinjoron kun griza barbeto.

Nina eĉ ne rimarkis, ke ŝi trairis la kelk-kilometran distancon de la urbocentro hejmen, preskaŭ ne memoris, kiel ŝi alvenis tien. Nur memoris ŝi penetran venton kaj pezajn pensojn. La lastaj ankoraŭ kaptis ŝin. Sed tiuj ne estis pensoj pri malfeliĉa amo, rompita koro kaj la senindulo. Ne, en tiuj pensoj ŝi simple poiome revenis al realeco, malsupreniĝis de la alteco de siaj ĥimeraj revoj pri nobla homo. Nina iĝis la iama Nina. Sed nun en ĉi Nina aperis io nova, iu amara postgusto de la antaŭnelonga seniluziiĝo. Ŝi ne plu povis resti indiferenta al la homoj, kia ŝi estis antaŭe. Ĉu ŝi koleris kontraŭ ili ? Iomete. Ĉu ŝi sentis sin trompita ? Certe. Ĉu ŝi ankoraŭ pensis, ke nur homo kapablas ami ? Parte. Ĉar ŝi ankoraŭ kredis, ke homoj ne povas esti malamikoj unu al la alia. Ĝuste en tiu momento Nina envenis en sian malpuran kaj, kiel ofte okazis, nelumigatan enirejon. Ŝi malfermis la stratpordon kaj paŝis certe en la mallumon, plu tremante pro malvarmo. Ŝi reflekse etendis antaŭen sian manon, esperante post kelkaj paŝoj palpetrovi la balustradon, sed anstataŭe trafis ion strangan. Nina eĉ ne havis tempon ektimi, kiam tiu io dolorige tordis ŝian etenditan brakon malantaŭ ŝia dorso kaj kovris ŝian buŝon. Nina ekkriis sensone en ies polmon aŭ pro timo, aŭ pro doloro, kaj sentis, kiel iu alia, ĝis nun kaŝita en mallumo, frapis ŝin sur la ventron. Nina denove kriis, denove sensone, ŝi volis kliniĝi, sed ne povis. Iu flustris en ŝian orelon, ke ŝi ne moviĝu, kaj la virino senmoviĝis, moviĝis nur ŝiaj larmoj. Ili fluis de la okuloj sur tiun aliulan manon. Tiu dua lumigis la vizaĝon de Nina, kaj senprokraste ŝiris la orajn orelringojn el la oreloj kaj la ĉeneton de la kolo. Nun ŝi eksentis ankaŭ sangoguton sur sia kolo, kiu fluis el la ŝirita orelo. Li ektiris la sakon de ŝiaj manoj, Nina eĉ ne pensis kontraŭiĝi, senprokraste ellasis ĝin. Poste tiu, kiu estis malantaŭe, ĉesigis sian brakumon kaj ili ambaŭ malaperis, lasante Nina-n kuŝi sur la malvarma cemento inter la stratpordo kaj la unua ŝtupo.

Nina plorsingultis laŭte, nun ŝi jam aŭdis sian ploron kaj estis certa, ke ĝin aŭdis ankaŭ ŝiaj najbaroj. Ŝi longe supreniris, tenante sian manon sur la balustrado, ĉar ŝiaj kruroj simple fleksiĝis, ŝi daŭre trenis sin ĝis sia kvina etaĝo, premante sian dekstran manon al la ventro, sed neniu pordo de iu loĝejo malfermiĝis. Ŝi tiris la ŝlosilon el la jakpoŝo (estis bone, ke ŝi havis kutimon meti ĝin tien) kaj malŝlosis la pordon.

En la koridoro Nina-n jam atendis Floro. Ĝi rigardis la virinon per siaj grandaj okuloj, kvazaŭ ĉion komprenante. Nina ne povis sin deteni, ŝi falis genue antaŭ la katino, brakumis ĝin kaj ploris, kisis ĝiajn moletajn harojn kaj denove ploris. Ili ankoraŭ longe kuŝis tiel duope en la koridoro, ĝis kiam Nina trankviliĝis kaj treniĝis en la banĉambron. Floro atendis ŝin ĉe la pordo kaj, kiam Nina sursofiĝis, sidiĝis apude surplanke.




Nina ne povis pri io pensi, ŝi sentis nur, kiel doloras ŝia ventro, kiel doloras la lezita orelo, kiel la genuo sentiĝas kvazaŭ furioze tordata, profetante veterŝanĝon. Larmojn, kvankam malofte, ankoraŭ verŝetis ŝiaj okuloj. Al Nina estis tiel amare, kiel neniam estis. Ŝi rompis sian bazan regulon, kaj la vivo donacis pro tio al ŝi teruran aventuron. Ŝi ne volis kompati sin, sed kompatis. Ŝi ĝojus ekdormi pli rapide kaj forgesi pri ĉio, sed, pro la neeltenebla doloro, pri la dormo restis al ŝi nur revi. Subite Nina sentis, ke Floro saltis al ŝi sur la liton. La katino tiom mallaŭte tenere murmuris… Nina ĉiam amis tiun sonon pli ol ajnan muzikon. Kutime Floro kuŝiĝis, volviĝinte bule, proksime de la kuseno, Nina pensis, ke tiel estos ankaŭ nun. Sed ŝi eraris. Floro kuŝiĝis ĝuste sur la malsanan genuon. Nina sentis varman lanugan korpeton, sentis ĝin spiri, kaj ĉio tio tiel trankviligis ŝin, tiel lulis. Jam ie en duondormo Nina komprenis, ke jam doloras nek ŝia genuo, nek ventro, nek orelo, ke ĝenerale nenio plu doloras kaj maltrankviligas. Ŝi sentis jam nek bedaŭron, nek ofendon, nek seniluziiĝon, sed nur tion, kiel forte ŝi amas Floron kaj kiel forte Floro amas ŝin.

**Elukrainigis Petro Palivoda**

**Originala rakonto :** Христина Козловська, *Квітка ;* aperis en la libro *Коштовніше за золото,* Brusturiv, Discursus, 2015

# Intelektaj Amuzoj :
# Por lernantoj, instruistoj kaj ĉiuj, kiuj amas nian lingvon !

**Jen unika libro. Unuan fojon en la historio de Esperanto estas eldonita pli ol 100-paĝa libro plene konsistanta el lingvaj ludoj ! Ja nia lingvo jam estas sufiĉe matura por doni la eblecon kompletigi tiom ampleksan libron el 43 ludoj kaj 1240 taskoj.**




La ludoj estas diversaj : literaj, vortaj, tekstaj, ŝercaj, eĉ poeziaj. Ĉiuj ludoj estas tute originalaj kaj preskaŭ ĉiuj nenie antaŭe publikigitaj. La libron oni povas uzi same por lernaj aŭ por distraj celoj ; oni povas solvi enigmojn konkure en teamoj (ekz., en kursoj de progresantoj) aŭ sole por propra plezuro.

Spertuloj ankoraŭoje konvinkiĝos pri la propraj scioj, kaj progresantoj trovos abundan terenon por plibonigi en amuza formo sian lingvan nivelon.

La libro estas rekomendata por ĉuj, kiuj amas nian lingvon

Tatjana Auderskaja, "Intelektaj amuzoj. Lingvaj ludoj en Esperanto", Mondial, Novjorko, 2016, ISBN **9781595693228,** 114 paĝoj. Mola bindo, 8.5" x 11" (21,5 cm x 28 cm)

**Aĉetu papere ĉe:** UEA / Mondial / Bookdepository / Amazon.com / Amazon.co.uk / Amazon.de / Amazon.ca / Amazon.jp / Amazon.es / Amazon.fr - aŭ **uzu la supran ISBN-numeron aŭ la libro-titolon** por serĉi ĉe **alia reta librovendejo**.

**Aĉetu elektronike ĉe:** Google Play

# Esperanto-renkontiĝoj

| | |
|---|---|
| **7 — 9-a de oktobro 2017 : ARE** | **Silver Bay, NY** |
| **19 — 21-a de majo 2018 : MeKaRo** | **Tririvero, QC** |
| **28-a de julio — 4-a de aŭgusto 2018 : UK** | **Lisbono, Portugalio** |
| **4 — 11-a de aŭgusto 2018 : IJK** | **Badaĥozo, Hispanio** |
| **6 — 8-a de oktobro 2018 : ARE** | **Silver Bay, NY** |
| **Somero 2019 : UK** | **Lahti, Finnlando** |
| **Somero 2020: UK** | **Montrealo, Kanado** |

# Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

| |
|---|
| Vendredo, 8-a de septembro 2017, ĉe Resto Végo St-Denis : Jarkunveno de ESK |
| Vendredo, 29 -a de septembro 2017, ĉe Resto Végo St-Denis |
| Vendredo, 13-a de oktobro 2017, ĉe Resto Végo St-Denis |
| Vendredo, 27-a de oktobro 2017, ĉe Resto Végo St-Denis |
| Vendredo, 10-a de novembro 2017, ĉe Resto Végo St-Denis |
| Vendredo, 24-a de novembro 2017, ĉe Resto Végo St-Denis |
| **Sabato, la 16-a de decembro 2017 : Zamenhof-festo (ekde 17-a horo ; loko anoncota)** |

* Noto : manĝo je la 18 h, babilado ekde 19:30 h. Pli pri la horaro : ĉe www.esperanto.qc.ca/eo/activites. **Resto Végo St-Denis (restaurant végétarien) :** 1720, rue St-Denis (entre de Maisonneuve et Ontario, métro « Berri-UQAM »).

# Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la autoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

**Redaktado kaj grafiko :** Yevgeniya (Ĵenja) Amis (riverego(ce) esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado :** Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain. **Estraranoj de ESK :** Normand Fleury (prezidanto), Suzanne Roy (konsilanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Nicolas Viau (vic-prezidanto), Joel Amis (konsilanto).

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

**Rédaction et graphisme :** Yevgeniya Amis (riverego(à) esperanto.qc.ca). **Correction :** Sylvain Auclair et François Lorrain. **Administrateurs de la SQE :** Normand Fleury (président), Suzanne Roy (conseillère), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Nicolas Viau (vice-président), Joel Amis (conseiller).

**Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2017.10.20**

**3-3791, av. Linton • Montréal • H3S 1T3 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca**

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca

**Vizitu nian retejon !**

***Visitez notre site web !***

www.esperanto.qc.ca




Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :

**www.pasportaservo.org.**

Vi povas ankaŭ kontakti Jed Meltzer <jedmeltzer@gmail.com>, kiu estas la peranto por Kanado.